

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

LA RENOVIGO
DE BEA

•

110 JAROJ DE LA
LIBERIGO
DE BULGARIO

•

INFORMOJ
EL UEA

•

ZAMENHOF AJ
TAGOJ

•

VIRINA VERKARO

•

UNUA KONGRESO
DE KUBAJ
ESPERANTISTOJ

•

SUKCESOJ
DE LA BULGARA
MEDICINO



LA KOMENCO

La bulgara esperantistaro atendis kun senpacienco kaj kun fido la Plenkunsidon de la Centra Estraro de BEA, okazinta en Sofio la 16-an de januaro j. k., ĉar tiu forumo metis la fundamenton, sur kiu oni efektivigos la renovigon de la tuta esperantista agado en nia lando.

[La Plenkunsidon partoprenis ne nur la membroj de la Centra Estraro, sed ankaŭ reprezentantoj de la societoj kaj la sekcioj ĉe BEA. Gastis la sociagantoj Hristofor Ivanov kaj Violeta Musakova.

En sia

AMPLEKSA RAPORTO

la prezidanto de BEA Sava Dălbokov emfazis, ke la renovigo de nia Asocio estos parto de la tuteca renoviga laboro, kiun nun realigas la bulgara popolo. En la raporto estis farita historia pritakso de la 80-jara organizita esperantista agado en Bulgario, estis substrekitaj la sukcesoj de nia esperantista movado, kiuj plimultiĝis dum la lastaj jaroj dank' al la kompreno kaj la helpo fare de la ŝtato. Ne estis prisilentitaj ankaŭ la eraroj en la asocia agado kaj en la laboro de apartaj esperantistoj.

La partoprenantoj en la Plenkunsido pridiskutis la proponitan en la raporto novan pli simplan strukturon de BEA kaj la novajn taskojn de la bulgara esperantistaro. La raporto estas dokumento, surbaze de kiu efektivigos la renovigo en la ĉiufanka esperantista agado ĝis la sekvonta kongreso de BEA. Tiu periodo sufiĉas, por ke ni ekhavu klaran impreson, ĉu la nova strukturo estas la plej konvena, ĉu estas bezonaj korektoj. Ĝi estos ankaŭ tempo por kontrolo de la elektita renoviga vojo. Pro tio oni rapide dissendos la raporton al ĉiuj asociaj ĉeloj.

Koncize dirite

LA NOVA STRUKTURO DE BEA

estos duflanka — Centra Estraro kaj societoj. Al CE funkcios ĝiaj Buroo kaj Sekretariato. Estos nek distriktoj, nek komunumaj estraroj de BEA, sed nur societoj, organizitaj laŭ la teritoria principo. En la pli grandaj urboj funkcios du aŭ tri societoj. En Sofio estos po unu societo en ĉiu urba komunumo. Ĉe la societoj (ankaŭ en lernejoj kaj entreprenoj) oni povos organizi E-klubojn laŭ intereso kaj profesioj. La kluboj kunlaboros kun la koncernaj sekcioj ĉe BEA. La ĝisnunaĵ sekcioj laŭ intereso kaj profesioj ĉe BEA plu ekzistos. En la loĝlokoj, kie estas pli ol unu societo, funkcios ankaŭ domoj pri E-kulturo, ĉe kiuj aktivos la kluboj.

Por realigo de la taskoj starantaj antaŭ CE de BEA, al ĝi oni kreas konstante funkciantajn komisionojn: pri instruado, pri kultura agado, pri organiza agado kaj pri internacia agado. Ĉe CE de BEA funkcios ankaŭ Financa-Ekonomia Fakto.

Post la tralego de la raporto sekvis

ELDIROJ DE PARTOPRENANTOJ:

Cano Ignev — membro de la Buroo de CE de BEA, parolis pri la graveco de la renoviga proceso kaj atentigis la partoprenantojn pri la neceso de eldonado en Esperanto ne nur de historia literaturo, sed ankaŭ de esploroj pri la agado de BEA en la nunaj sociaj kondiĉoj.

Petko Arnaudov el Pazargik faris konkretajn proponojn, interalie pri pli regula importado de eksterlandaj lernolibroj kaj lernohelpiloj; pri evito de koincido ĉe la datoj de naciaj kaj regionaj E-arangoj.

Hristo Manolov — membro de CE de BEA, el Pol-ski Trambes: Laŭ li la renovigo devas komenciĝi per pli granda aktiveco fare de la E-societoj, kiuj plenumu ne nur taskojn komisiitajn de CE, sed agadu pli iniciate. Li emfazis la seriozajn taskojn starantajn antaŭ la membroj de la Centra Estraro lige kun la laboro en apartaj loĝlokoj, ĉar jam ne ekzistas la distriktaĵ estraroj, kiuj ĝis nun realigis la kontaktojn inter CE de BEA kaj la societoj.

Prof. Kiril Popov — membro de la Buroo de CE de BEA, parolis pri la neceso modernigi la eldonan E-agadon, li rekomendis pri aktivan partoprenon en la laboro de la internacia E-organizo, ktp.

Marin Balčev — esperantisto-veterano el Sofio, alvokis al preparo de pli allogaj poresperantaj propagandiloj.

Dimităr Hristov — membro de CE de BEA el Jam-bol, substrekis, ke nun sur ĉiuj niveloj de nia agado oni devas elekti la plej kapablajn aktivulojn, ĉar ili grandparte efektivigos la renovigon en nia movado. Li ankaŭ parolis pri restarigo de la Esperanta emisio de Radio Sofio.

Georgi Mihalkov — membro de CE de BEA, esprimis siajn konsiderojn pri plibonigo de la poligrafia nivelo de la asociaj eldonaĵoj kaj pri pli aktiva eldonagado de BEA.

Vladimir Jelev — membro de CE de BEA el Plovdiv proponis, ke la societoj estu kreataj laŭ la nombro de la esperantistoj en ĉiu konkreta loĝloko. Li diris, ke en la urboj, kie funkcios pli ol unu societo estas nepre necese, ke la societo zorgu pri kunordigita kunlaboro kun la lokaj soci-politikaj organizaĵoj.

Nikola Aleksiev — esperantisto-veterano, membro de la Buroo de CE de BEA, memorigis, ke antaŭ multaj jaroj BEA havis la saman duflankan strukturon, dank' al kiu la esperantista movado en Bulgario multe prosperis. Tion pruvas la ekzisto de la tre populara tiutempe ĵurnalo „Mejdunaroden Rabsekor“, kiu apreadis dank' al la iniciatemo de la E-societoj, subtenata de CE de BEA. Li alvokis la pli maljunajn kaj spertajn esperantistojn konstante helpi la pli junajn E-generaciojn. Tiu helpo garantios konservon de niaj bonaj E-tradicioj, kaj la energio kaj la pli moderna pensmaniero de la junularo multe kontribuos por la plua prospero de nia movado. N. Aleksiev substrekis ankaŭ la neceson de plibonigo de la BEA-eldonagado.

Post akcepto de la plenkunsida Decido, Sava Dălbokov tralegis proponojn pri la membraro de la komisionoj, pri ŝanĝoj en la Buroo de CE de BEA. La plenkunsido akceptis la proponojn. Laŭ ili la Buroo konsistos ne el 19 kiel ĝis nun, sed el 13 membroj. Kiel novaj membroj de la Buroo estis elektitaj: Nedka Valjavičarska, Radoslav Paraŝkevov, Dimităr Dimitrov kaj Maria Jankova, kiu estis aprobita de la Plenkunsido kiel la nova ĉefredaktoro de la asocia organo „Bulgara Esperantisto“, pro la pensiigo de la ĝisnuna ĉefredaktoro Dončo Hitrov, kaj por liaj novaj gravaj taskoj kiel membro de la Komisiono pri kultura Agado kaj respondeculo pri la propagando de Esperanto.

La estro de la nova Financa-Ekonomia Fakto estos Konstantin Ikonov.

La decidoj de la Plenkunsido kontribuos al plua disvastigo de la Esperanto-movado en nia lando, kiu havas indan lokon kaj ludas gravan rolon en nia soci-kultura vivo.

M. BOJAGIEVA



La renovigo de BEA

(El la raporto de SAVA DĀLBOKOV,
prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio,
antaŭ la Plenkunsido de CE de BEA,
okazinta la 16-an de januaro 1988)

Nia Plenkunsido okazas en rimarkinda, grava historia momento. En la lando efektiviĝas profunda reorganizo en ĉiuj sferoj de la socia vivo — en la ekonomio, en la sociala kaj kultura sfero, en la bazo kaj en la superbazo. Tiu reorganizado realigas dank'al la strategia kurso aprobita de plej altaj ŝtataj instancoj pri kvalite nova kreskado en ĉiuj sferoj de nia vivo.

La tasko, kiun ni starigas al ni hodiaŭ estas skizi la vojojn, la formojn kaj rimedojn por reorganizo de Bulgara Esperantista Asocio, konsiderante la nuntempajn realaĵojn kaj la specifaĵojn de nia organizo, kiu estas nedisigebla parto de la socia strukturo en nia lando kaj kolektiva membro de la Patrolanda Fronto. La planata reorganizado de BEA estas nek unuopa akto, nek kampanjo. Ĝi rilatas ankaŭ la aliajn sociajn organizaĵojn kaj la tutan socion en nia lando kaj estas longdaŭra proceso, kiun ni efektiviĝos iom post iom, konsekvence.

Kion ni celas per la reorganizo de nia Asocio?

UNUE, plialtigi la rolon kaj la aktivecon de la esperantista societo kiel baza ĉelo de la Asocio, konsiderante la principon pri realigo de la reorganizado de malsupre. La societoj devas esti centroj de la esperantista agado surloke, pliriĉigante ĝin laŭ enhavo kaj formo; ili devas stimuli la iniciatemon de staj membroj, varbi novajn membrojn, precipe gejunulojn, kaj eduki ilin en la humanisma spirito de la esperantista movado.

DUE, altigi la nivelon de la idea-eduka kaj instrua agado, celante ĉiam pli fortan manifestigon de la socia aktivado de la esperantistoj.

TRIE, racie utiligi la sekciojn kaj klubojn laŭ intereso en la lando kaj la internacian kunlaboradon cele esplori kaj enkonduki en nian landon pere de Esperanto la pozitivan sperton de la socialismaj kaj aliaj landoj kune kun kompetentaj organoj kaj organizoj.

KVARE, levi la rolon de Bulgara Esperantista Asocio kiel kunordiganto de la tuta agado, efektivigata de la bulgaraj geesperantistoj enlande kaj eksterlande.

KVINE, krei harmonian sistemon por starigo de internaciaj kontaktoj kaj interrilatoj kun eksterlandaj esperantistaj organizaĵoj.

Post la likvido de la diskutoj kaj post formigo de la novaj administraj unuoj — la departementoj, oni ne antaŭvidas la ekziston de departementaj estraroj de Bulgara Esperantista Asocio. Tial estas absolute necesa plibonigo de la stilo kaj la labormetodoj de la Centra Estraro, de la Buroo kaj de la Sekretariato de BEA. La membroj de CE de BEA devas aktive partopreni la laboron de la diversaj fakoj de la Asocio kaj kontribui por efektivigo de la prenitaj decidoj.

Ce la Centra Estraro de BEA estas kreitaj novaj helporganoj (komisionoj kaj aliaj), kio plivastigas la principojn de socia sindevigo kaj engaĝigo en la laboro de la guidorganoj de Bulgara Esperantista Asocio, plifortigas la demokratecon, kompetentecon kaj la aferecon de ilia agado.

Konsiderante la ĝisnunan praktikon, estis

decidite, ke ĉe la Centra Estraro de BEA funkciiu la jenaj komisionoj: 1) Komisiono pri Instruagado, 2) Komisiono pri Kultura Agado, 3) Komisiono pri Internacia Agado kaj 4) Komisiono pri Organizaj Problemoj kaj Taskoj. La apartaj sekcioj ĉe BEA estos memstaraj fakoj, kies aktivadon helpos la koncernaj komisionoj. Ĉe la Komisiono pri Internacia Agado formiĝas speciala Buroo pri diversaj esperantistaj aranĝoj kaj iniciatoj, kiu organizos precipe la turismajn aranĝojn kaj vojaĝojn de bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj. La taskojn lige kun la ĝenerala administra-financa laboro de BEA plenumos la nove kreita Financa-Ekonomia Fakoj ĉe CE de BEA, kiu kontrolos ankaŭ

la efektivigon de la buĝeto kaj de la financa disciplino de la Asocio.

La novaj strukturoj kontribuos por la kreo de pli efika kaj aktiva organiza agado, kio respondos al la gravaj taskoj starigitaj antaŭ Bulgara Esperantista Asocio.

La grava periodo, en kiu ni vivas, postulas ankaŭ de la bulgaraj esperantistoj venki malnovajn konceptojn kaj stereotipojn, apliki novan pensmanieron kaj agadon, novajn kreaĵn metodojn. Tio, sendube, estas la plej ĝusta vojo por renovigo de la esperantista movado en Bulgario.

DECIDO

de la Plenkunsido de la Centra Estraro
de Bulgara Esperantista Asocio

Aŭskultinte la raporton de Sava Dălbokov, prezidanto de BEA, pri la reorganizado de la Asocio kaj post la diskutoj la Plenkunsido de CE de BEA

DECIDIS:

1. Plene aprobas la prezentitajn en la raporto „Bazajn principojn pri la reorganizo de BEA“, kiuj baziĝas sur la Decidoj de la Julia Plenkunsido de CK de BKP pri la reorganizo de la tuteca sociala kaj soci-politika vivo en nia lando, respegulantajn la neceson de ŝanĝoj en la funkcioj kaj la strukturo de la Asocio.

2. Rekomendas al la esperantistaj societoj kaj la gvidorganoj de la Asocio sur ĉiuj niveloj kiel ankaŭ al la sekcioj reorganizi sian agadon konforme al la Bazaj principoj pri la reorganizo de BEA, prezentitaj en la raporto antaŭ la Plenkunsido de BEA.

3. Komisias al la Buroo de CE de BEA pridiskuti kaj akcepti ĝis la 31-a de marto j. k. regularojn pri aplikado de la Bazaj principoj pri reorganizo de BEA kaj pri la plibonigo de la disciplino kaj la ordo en la Asocio.

4. De la 1-a de februaro ĝis la 31-a de marto j. k. la esperantistaj societoj okazigu kunvenojn kaj la sekcioj — konferencojn aŭ ĝeneralajn kunvenojn, por konigi al siaj membroj la Bazajn principojn pri la reorganizo de BEA kaj la decidojn de la Plenkunsido kaj plani la necesajn rimedojn por ilia realigo. La kunvenoj kaj la konferencoj elektu kiel estraranojn de la societoj kaj la sekcioj la ĝisnunajn membrojn de la distriktaj estraroj de BEA, samkiel elstarajn aktivulojn.

La Plenkunsido de CE de BEA unuanime aprobis la strukturon kaj elektis la gvidorganojn de BEA:

BURAO DE CE DE BEA

Sava Dălbokov — Prezidanto de BEA

Dimităr Papazov — Ĝenerala Sekretario de BEA

Canko Ignev	Prof. d-ro Kiril Popov
Cvetka Miteva	Kunĉo Vălev
Dimităr Dimitrov	Maria Jankova
Ivan Ĉulev	Nedka Valjaviĉarska
Jordan Angelov	Radoslav Paraŝkevoj
	Violin Oljanov

SEKRETARIATO DE CE DE BEA

Dimităr Papazov	Nedka Valjaviĉarska
Cvetka Miteva	Radoslav Paraŝkevoj
Ivan Ĉulev	

KOMISIONO PRI INSTRUAGADO

1. Prezidanto — Violin Oljanov
2. Sekretario — Nedka Valjaviĉarska
3. Redaktoro de la bultenoj „Informilo“ kaj „Filologo“ — Marin Băcev
4. Prezidanto de la Instruista Sekcio — Libertaria Mladenova
5. Respondeculo pri foresta instruado — Bistra Dojĉinova, instruanto

6. Instruanto — Ivanka Spasova
7. Instruanto — Slavjanka Kaleva
8. Instruanto en superaj lernejoj — Fani Miĥajlova (Plovdiv)
9. Scienca agado kaj respondeculo pri instru-teknikaj helpiloj — Bojan Lalov
10. Kunlaboranto pri instruagado en la esperantistaj societoj — Andrej Angelov (Samokov)
11. Instruanto-veterano — Maria Pejкова (Veliko Tărnovo)

KOMISIONO PRI KULTURA AGADO

1. Prezidanto — Kunĉo Vălev
2. Sekretario — Ivan Ĉulev
3. Reprezentanto de la Sekcio de Esperantistoj-Artagantoj — Belka Beleva
4. Reprezentanto de Bulgara Esperanto-Teatro — Gertruda Lukanova
5. Ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ — Maria Jankova
6. Respondeculo redaktoro de la Presejbazo — Georgi Miĥalkov
7. Reprezentanto de junaj esperantistoj — kreaĵagantoj — Nevena Krăsteva
8. Reprezentanto de esperantistoj-artkreaĵoj — Miĥail Cobanov
9. Respondeculo pri la propagando de Esperanto — Donĉo Hitrov
10. Redaktoro de „Informado „Esperanto“ — Slavĉo Davidov
11. Reprezentanto de Literatura Rondo — Cvetana Kostova

KOMISIONO PRI ORGANIZA AGADO

1. Prezidanto — Dimităr Papazov
2. Sekretario — Radoslav Paraŝkevoj
3. Prezidanto de la Turista Sekcio — Dimităr Muŝev
4. Prezidanto de la Junulara Sekcio — Dimităr Dimitrov
5. Prezidanto de la esperantista societo de Polski Trâmbeŝ — Hristo Manolov
6. Prezidanto de esperantista societo en Sofio — Penka Fileva
7. Respondeculo pri la laboro kun gelernantoj — Maja Cenкова, instruistino (Sofio)
8. Respondeculo pri la esperantistaj societoj — Vasil Vutov, membro de CE de BEA
9. Membro de la Plenkunsido de CE de BEA — Cvetana Stamenova
10. Membro de la Plenkunsido kaj de CE de BEA — Jordan Angelov

KOMISIONO PRI INTERNACIA AGADO

1. Prezidanto — Canko Ignev
2. Sekretario — Cvetka Miteva
3. Sekretario de MEM — Vasilka Cvetkova
4. Prezidanto de la MEM-sekcio ĉe BEA — Dimităr Haĝiev
5. Membro de la Komitato de UEA — Petăr Todorov
6. Membro de la TEJO-komitato — Ljubomir Trifončovski (Vraca)
7. Direktoro de la Filio de IEK en Varna, respondeculo pri kontaktoj kun turismaj organizaĵoj — Georgi Cvetkov (Varna)
8. Aktive korespondanta esperantistino — Maria Angelova

La Buroo de CE de BEA rajtas fari ŝanĝojn en la konsisto de la komisionoj, konsiderinte tion necesa.

Cele de vigligo de la agado de la Buroo de CE de BEA kaj de ĝia junigo, por ke ĝi fariĝu vere aktive aganta organo, la prezidanto S. Dălbokov proponis malpliigon de ĝia konsisto. Li informis, ke la ĝisnuna membro de la Buroo — la esperantisto-veterano Nikola Aleksiev petas esti liberigita de liaj funkcioj en la Buroo, kion la Plenkunsido aprobis. Estis unuanime aprobita ankaŭ la propono pri liberigo el la konsisto de la Buroo de la jenaj ĝisnunaj membroj: Hristo Gorov, Krăstju Karucin, Nano Kjuĉukov, Petăr Todorov (komisiita plenumi alian respondecan laboron), Donĉo Hitrov, Angel Todorov, Cvetana Stamenova kaj Georgi Nejkov.

Unuanime la Plenkunsido aprobis la proponon, ke Nedka Valjaviĉarska, Radoslav Paraŝkevoj, Dimităr Dimitrov kaj Maria Jankova estu membroj de la Plenkunsido kaj de la Buroo de CE de BEA. Tiamaniere la konsisto de la Buroo estis malpliigita de 19 al 13 membroj, la meza aĝo de la salajrataj kunlaborantoj estas 33 jaroj — kio montras konsiderindan junigon de la konsisto de la Buroo.

Unuanime estis aprobita ankaŭ la propono de S. Dălbokov pri elekto de Hristo Gorov, Nikola Aleksiev, Krăstju Karucin, Nano Kjuĉukov kaj Georgi Dolapĉiev honoraj membroj de BEA.

Post finiĝo de la laboro de la Plenkunsido okazis Renkontiĝo de la Buroo de CE de BEA kun la prezidantoj de la esperantistaj societoj, kiuj ricevis aldonajn instrukciojn kaj klarigojn lige kun iuj aktualaj taskoj kaj pri ilia estonta agado.

*Sofio,
la 16-an de januaro 1988*

1988 DAŬRIGU LA ATINGOJN DE ELSTARA 1987

Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA

Kiel ajn oni konsideras, la jaro 1987 estis elstara jaro por Esperanto. Tra la tuta mondo, ene de lokaj grupoj kaj landaj asocioj oni digne festis la centjarigon per specialaj publikaj kunvenoj, jubileaj kongresoj, eldonaĵoj kaj, plej grave, informa laboro. La kvanto de artikoloj pri Esperanto, kiuj aperis tra la mondo, estis senprecedence alta, kaj la atento, kiun ĝi ricevis ĉe la publiko kaj la formantoj de la publika opinio estis pozitiva kaj impona.

La historio de la Jubileo vere komenciĝis en 1985, kiam la Generala Konferenco de Unesko akceptis rezolucion favoran al Esperanto, ricepe dank' al la energia laboro de nia kolego Tibor Sekelj. Ĝi iasence kulminis en Varsovio en julio, kiam sesmil homoj el ĉiuj mondopartoj kolektiĝis en la plej granda kunveno de parolantoj de Esperanto en la tuta historio de la lingvo.

La laboro daŭras. Dum la venontaj monatoj aperos ĉe UEA tuta lavango da eldonaĵoj. Okazos la unua kunsido de la organiza komitato de la Centro Zamenhof en Bjalistoko. En pluraj landoj oni planas agadojn ligitajn al la Jubileo, kiuj tamen okazos en la venontaj monatoj. Efektive, oni devas atenti, ke la jaro 1988 ne estu jaro de ripozo, ke la granda rapidiĝo kaj intensiĝo de nia agado en 1987 reprezentu ne izolitan kulminon, sed novan ŝtupon en nia progreso.

La Estraro de UEA, aŭdinte raportojn pri la imponaj sukcesoj kunlige kun la Jubileo en 1987, lastatempe decidis formale fermi la Jubileon per speciala ceremonio dum la Universala Kongreso en Roterdamo. Intertempe UEA daŭrigos la jubilean agadon — tiel ke

nia jubilea periodo daŭros ĝis la oficiala fermo en julio. Ni alvokas al ĉiuj organizaĵoj ligitaj al UEA, kaj al ĉiuj aliaj Esperanto-organizaĵoj, daŭrigi la laboron, kaj eĉ plani novajn agadojn, por la Jubileo 1987—88.

Mi kredas, ke mi esprimas la dankemon de ĉiuj niaj kolegoj, se mi kvazaŭ formale dankas tiujn, kiuj per tiel granda fortostreĉo progresigis nian movadon en 1987. La jaro 1988 estu jaro de daŭrigo kaj de nova atingoj. La jubileo plu progresu. Al ĉiuj anoj de nia Asocio kaj al ĉiuj kunlaborantoj mi deziras fruktodonan, prosperan kaj pacan Novan Jaron, dum kiu ni starigu novajn komunikaĵajn pontojn inter la homoj per la Internacia Lingvo Esperanto.

Humphrey TONKIN

ZAMENHOF-PREMIO 1987

AL UNICEF-DIREKTORO

James P. Grant, ekde 1980 la Ĝenerala Direktoro de la Infan-Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj (UNICEF), fariĝis la tria ricevinto de la Premio Zamenhof por Internacia Kompreniĝo en ceremonio la 11-an de decembro 1987 en Novjorko, Usono.

D-ro Grant okupis gravajn postenojn en la usona registaro kaj en diversaj fakoj de UN, speciale koncerne internacian evoluhelpon. La organizaĵo, kiun li nun gvidas, UNICEF, estas vaste estimata pro siaj klopodoj plibonigi la sano-, nutro- kaj edukostaton de infanoj tra la mondo: laboro, kiu interalie gajnis por ĝi la Nobelpremion por paco en 1965.

La Premio Zamenhof estis kreita de UEA en 1985, kun la celo rekoni kaj subteni homojn, kiuj notinde kontribuis al la afero de internacia kompreniĝo kaj al realigo de la ideoj de la aŭtoro de Esperanto. Ĝis nun ricevis ĝin ankaŭ Robert Muller, asista ĝenerala sekretario de UN, kaj Amadou Mahtar M'Bow, ĝenerala direktoro de Unesko.

PAC-SEMINARIO LANĈAS NOVAN EPOKON EN LA DISVASTIGO DE ESPERANTO

La finon de la Jubilea Jaro 1987 markis interalie notinda paŝo en la eksteraj rilatoj de Universala Esperanto-Asocio. La unuan fojon en sia preskaŭ 80-jara historio, la Asocio venis al interkonsento kun influa internacia organizaĵo, antaŭenigi la uzon de Esperanto kun alia grava socia movado. Tiu atingo, grava per si mem, samtempe brile ilustras la kreskantan prestiĝon de la Internacia Lingvo, kiu frontas senprecedencajn eblecojn de disvastigo en la tuj-venonta jardeko.

La 31-an de oktobro kaj 1-an de novembro 1987, okazis komuna seminario en Helsinko, Finnlando, inter UEA kaj Monda Pac-Konsilio. MPK estas unu el la plej aktivaj kaj influhavaj internaciaj organizaĵoj en la monda pacmovado: ĝi kunlaboras i. a. kun Unesko, Unuiĝintaj Nacioj, la Movado de Nealiancitaj Landoj k.s., kaj ĝiaj landaj sekcioj ludas gravan rolon en la pormalarmadaj kaj

kontraŭrasismaj movadoj en multaj landoj.

La seminario, sub la temo „Interhoma kompreniĝo, interpopola paco“, celis esplori la komunaĵojn kaj diferencojn inter la Esperanto- kaj pacmovadoj. Tion ĝi faris tre sukcese, kun la partopreno de ĉ. 25 esperantistoj (inkluzive de la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, la prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado, d-ro Imre Pethés, kaj la prezidanto de Tutmonda Junulara Esperantista Organizo, Jan Koszmaluk), kaj deko da reprezentantoj de MPK (inkluzive de ties prezidanto Romesh Chandra). D-ro Tonkin emfazis, ke Esperanto ne estas celo en si mem, sed esenca rimedo por la egaleca diskuto de tutmondaj problemoj; kaj la redaktoro de „Esperanto“, Mark Fettes, poste donis tre konkretajn argumentojn por la utilo de Esperanto al la pacmovado.

Siaflanke, s-ro Chandra elstarigis la rolon de rektaj homaj kontaktoj en kontraŭbatalo de la „bildo de la malamiko“, ŝlosila faktoro en la eblico de militismo kaj rasismo. Li elokvente pledis por granda koalicio de tiuj movadoj, kiuj laboras por pli paca kaj justa mondo, surbaze de komunaj interesoj kaj principoj.

Entute deko da referaĵoj kaj interaj diskutoj kondukis al la adopto de komuna interkonsento, fine de la dua tago. Ties ĝenerala senco estas, ke Monda Pac-Konsilio pli intense uzos Esperanton kaj aktive laboros por disvastigi ĝin, dum UEA donos pli da emfazo al la temo de paco en siaj kongresoj kaj eldonaĵoj, kaj instigos la esperantistojn pli vigle kaj funde diskuti ĝin. La fina dokumento enhavas sufiĉe detalan kunlabor-programon, kiu antaŭvidas, i.a. internacian konferencon pri „lingvo kaj Paco“ en 1989, eventuale sub la aŭspicio de Unesko.

UEA — Informa Centro

ESPERANTO PRILUMIS MIAN VIVON

Okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto mi decidis rakonti por la legantoj de „Bulgara Esperantisto“ kiel mi esperantistiĝis kaj pri la laboro de nia societo „Stojo Kalpazanov“ en Velingrad.

Mi naskiĝis en 1907 en v. Balanovo, distrikto de Kjustendil. Kiam mi estis 2—3-jara knabeto, mia patrino mortis. Sin mi ne memoras. Mia patro estis pereinta en 1917 dum la Unua Mondmilito. En 1918 oni akceptis min en la pensiono por orfoj en u. Kjustendil. Tie mi finis progimnazion.

En 1927 mi finis agrikulturan mezlernejon en u. Pleven. Reveninte en mian naskiĝvilaĝon, mi vidis miajn plej proksimajn amikojn: Boris V. Popov, lernanto en la komerca gimnazio de u. Svištov kaj Georgi Belev — kudristo. Ili parolis inter si nekonatan al mi lingvon. Mi demandis: „Kia lingvo ĝi estas?“ Belev respondis: „Tio estas Esperanto. Se vi volas, ke ni fariĝu triopo, vi devas komenci lerni ĝin“. Tuj mi konsentis kaj eklernis Esperanton. Tutan tagon mi lernis. Ĉe vesperiĝo nia triopo promenadis. Boris kaj Georgi kontrolis miajn konojn kaj korektis la erarojn. Unufoje mi kaj Georgi iris en u. Dupnica (nun Stanke Dimitrov). Tie li konatigis min kun Nikola Aleksiev, tiam lernanto en la gimnazio. Lerta esperantisto, Nikolĉjo (tiel oni nomis lin) estigis la tria mia E-instruisto. Li helpis al mi perfektigi la lingvon.

En 1928 mi, Boris Popov kaj Kosta Georgiev, forĝisto en Dupnica, partoprenis la 15-an landan esperantistan kongreson en u. Vraca. Ni tranoktis en la domo de Radoslav Triĉkov — la nuna E-veterano. Mi neiam forgesos tiun ĉi kongreson kaj mian unuan kontakton kun fremdlandanoj-esperantistoj — el Turkio kaj Ĉeĥoslovakio. Mi entuziasme akceptis la ideojn de Esperanto pri paco, frateco, interkompreniĝo kaj fervore mi ekagis por Esperanto.

De 1931 ĝis 1933 mi studis en la Instruista Pedagogia Instituto en u. Plovdiv. Fininte ĝin en 1933 mi estigis instruisto en Jakoruda, Blagoevgrad-distrikto. Ĉi-tie mi malfermis E-kurson Post la fino de la 7-a leciono la poliestro dispelis nin. Malgraŭ tio iuj kursoj daŭrigis lerni ĝin individue. La esperantisto Vladimir Gjoŝev malfermis restoracion, kiun ni nomis „Esperanto“.

En 1945 mi ŝanĝis la instrulokon — mi estigis instruisto en v. Lăgane (nun kvartalo de u. Velingrad). Mia unua tasko estis konatiĝi kun esperantistoj. Oni direktis min al Dimităr Peŝterski el v. Kamenica (nuntempe ankaŭ parto de Velingrad). Mia celo es-

tis fondi esperantistan societon. Kunvenis: Nikola Godev, Dimităr Peŝterski, Aleksandăr B. Canov, Todor Ang. Vlaŝov, Trendafil Toĉev k.a. Ni nomis la fonditan societon „Stojo Kalpazanov“ — je la nomo de la partizano, kruele pafmortigita de la polico en majo 1944. Kun granda ĝojo ni tralegis en numero 2, oktobro 1945, de revuo „Internacia Kulturo“ informon pri nia societo. Dum 1945/46 mi instruis Esperanton en tria klaso kaj fine de la lernojaro ni aranĝis en la urba legejo propagandan Esperantan vesperon. Oni komencis korespondadon kun francaj gelnantoj.

Dum la 33-a landa E-kongreso en Varna, julio 1958, mi ekzameniĝis por ricevi instrurajton. La ekzamenkomisiono el eminentaj Esperanto-pedagogoj — Ivan Sarafov, Simeon Ĥesapĉiev kaj Georgi Dimov, enmarnis al ni atestilon № 6 de 28-a de julio 1958. Same dum la kongreso oni postulis de ni fonda protokolon. La 10-an de januaro 1958 mi denove kolektis 13 esperantistojn, kiuj unuanime subskribis la fonda protokolon de nia E-societo. Apenaŭ tiam mi eksciis, de Manol Colev, ke en 1925 en v. Lăgane estis fondita E-societo „Ĉepino“, kiu funkciis verŝajne ĝis 1934.

Depost 1958 societo „St. Kalpazanov“ aktive laboras por disvastigo de Esperanto, aranĝas ĉiujare internacian E-seminarion-feriadon, organizas korespondadon k.a. Tiu ĉi agado efektiviĝas dank' al kolektivo de E-veteranoj: Manol Colev, ĝia konstanta prezidanto dum la periodo 1969-1985, nun honora prezidanto, Atanas Gaĝev — multjara prezidanto de la kontrolo komisiono, ing. Boris Marinov — multjara prezidanto kaj vicprezidanto, Nikola Godev — ankaŭ multjara prezidanto kaj fondinto de la societo, Mara Kolĉagova k.a.

Granda parto de la nunaj societaj atingoj estas ŝuldataj al la pli juna generacio: ing. Boris Gaĝanov — prezidanto, Elena Janĉeva — sekretariino kaj kassistino, Svetla Bizeva, Vaska Vardarova, Ivan Sergiev, Vasil Briĉev, Ĝalâbina Budinova, Dimităr Jdrakov k.a.

Mi partoprenis kelkajn universalajn kongresojn: Sofio (1963), Vieno (1970), Ateno (1976), Varna (1978) kaj vicen da bulgaraj E-kongresoj.

Mi estas jam 80-jara, tamen mi esperas, ke mi daŭre helpas la laboron de la societa estraro. En Velingrad ekzistas bonaj kondiĉoj por disvastigo de Esperanto, ili ankoraŭ pliboniĝos, kiam estos konstruita nia propra klubejo — la revo de ĉiuj societanoj.

Nikola GODEV

NAUMO SIGAL-PODOLSIJ — 90-JARAGA

La 7-an de marto j.k. la elstara sovetia esperantisto-veterano Naumo Sigal-Podolsij, delegito de UEA, honora prezidanto de la E-movado en Odeso, fariĝis 90-jaraga.

Per sia abnegacia laboro por la disvastigo de Esperanto en Sovetunio kaj en la tuta mondo dum dekoj da jaroj, N. Sigal-Podolskij estas modelo de esperantisto. La feliĉa jubileulo havas amikojn en pli ol 35

landoj kaj pere de „Bulgara Esperantisto“ li invitas tiujn el ili, kiuj havos eblecon viziti Odeson dum la jaro, gastis en lia domo, kies pordoj estas vaste malfermitaj por ili — strato Kirova 52, loĝejo 25, etaĝo 2, Odeso, USSR.

Ni esprimas niajn plej korajn salutojn kaj bondezirojn al nia estimata amiko kaj multjara kunlaboranto N. S. Podolskij.

„BE“

NOVA GRAMOFONDISKO

Sub la titolo „Horo de instruistinoj-esperantistinoj“, en Pazarĝik — Bulgario“ (BALKANTON-BXK 3913) aperis malgranda gramofondisko, eldonita okaze de la centjariĝo de Esperanto.

La kovrilo de la disko estas bele aranĝita: sur la antaŭa flanko kolora bildo prezentas dudek instruistinojn-kantistinojn dum koncerto, kune kun ilia pianistino kaj la juna ĥorĝvidanto Angel Canov. Sur la posta flanko oni povas legi la tekstojn de la surbendigitaj kantoj.

La disko enhavas du kantojn: la vaste konatan „Pa-trujo“ — laŭ teksto de Petko Račov Slavejkov kaj muziko de la unua bulgara profesia komponisto Emanuel Manolov. La dua kanto — „Ni gardu la pacon“, estas, laŭ mi, nova kaj nekona. La aŭtoroj estas indikitaj sur la disko: * * * VI. Georgiev.

La kantado de la ĥoro estas altnivela, belsona, vig-la kaj emocia. Cetere, la kantoj en tiu malgranda gramofondisko taŭgas por vigligi la etoson dum kunvenoj kaj festoj kaj esti plenumataj dum ekskursoj.

Kompreneble, oni rajtas demandi: kiamaniere ni povus posedi tiun diskon? Jen estas la respondo de Petko Arnaudov el Pazarĝik: „Ĉiu leganto de revuo „Bulgara Esperantisto“, kiu sendos al la eldonanto, (Bulgario, 4400 Pazarĝik, str. „Gurko“ 3a, kelkajn bildkartojn en filatele afrankita koverto, konvencajn por ekspozicio, ricevos senpage la gramofondiskon“.

Do, karaj legantoj, rapidu sendi viajn kontribuojn

Konklude mi deziras atentigi pri kelkaj „bagatelaj“, kiuj laŭ mi ne estas malgravaj.

1. Sur la posta flanko de la kovrilo, kie troviĝas la teksto de la kantoj, ripetiga „DE de BEA-Pazarĝik“, sed mankas la aŭtoroj de la kantoj.

2. Kutime antaŭ la nomo de la komponisto oni skribas „m“ kio signifas „muziko“ kaj antaŭ la nomo de la poeto — „t“, kio signifas „teksto“. Sur la disko mankas tiuj klarigoj.


3. Sur la disko oni skribas „Hor. A. Cenov“. Tiamaniere skribita, la vorto Hor., sen la supersigno, (havas tre malklaran signifon. Pli bone „ĥorĝvidanto“, aŭ ĥorestro estu plene skribita.

4. Mi konstatas, ke tre ofte aperas gramofondiskoj kun malĝustaj aŭ eraraj (sur la gramofondiskoj de Jana Cikalova oni eraris la nomon de A Haĉaturjan kun tiu de V. Muradeli). Tiuj faktoj parolas pri ne-sufiĉa precizeco kaj kompetenteco.

Dezirinde estas, ke la eldonantoj estu pli zorgemaj tiurilate!

Dimităr TERZIEV

Sub hispana ĉielo



Segovia — La Alcázar kaj la preĝejo Vera Cruz

(Daŭrigo de n-ro 2/88)

EN SEGOVIA KAJ TOLEDO —
LAŬ LA SPUROJ DE DONKI-
ROTO KAJ SANĈO PANSA

Norde de Madrido etendiĝas la vastega regiono de Malnova Kastilio, kies centro estas la antikva urbo Segovia (90 kilometrojn for de la ĉefurbo). Survoje al Segovia ni restis dum mallonga tempo en la Nacia Parko — ĥaoso el rokejoj, profundaj intermontaj valoj kaj raraj specoj de pinarboj. La pejzaĝo estas ege impresa, sed iom pre-manta, malĝoja.

Ni transveturis altan montoĉe-non (2450 m), nomatan pro ĝia reliefo „Mujer muerta“ (Mortinta Virino). Ĝi vere tre similas la formojn de kuŝanta virino. En Guadarama-montaro troviĝas la mondfamaj ski-kurejoj, kie okazas inter-naciaj ski-konkuroj. Nun oni povis vidi nur la multnombrajn ski-lif-tojn kaj luksajn hotelojn, super kiuj flugis agloj. . .

Rigardata de la altaĵoj, Segovia similas al ŝipo, ĵetinta ankron en la ebenaĵo, kies pruo formas la Al-cázar — kastelo kaj defendbastiono de la XII jarcento, el la epoko de

reĝo Alfonso VI, ĉirkaŭita ambaŭ-flanke de riveroj Eresma kaj Clamo-res. Rimarkindaĵo de la urbo estas la bonege konservita impona romana akvedukto, 728 m longa, pli ol 60 m alta, konstruita antaŭ pli ol 2 mil jaroj. Ĝi estas unu el la plej grandaj en la mondo. Kaj vera mistero: nek akvo, nek iu ajn alia spuro de la romia epoko en la urbo. Nur en la najbara urbeto Mu-reyo troviĝas 2-3 rompitaĵ romiaj kolonoj kaj nenio pli! . . . Forte impresas la geniĉeco de la romiaj konstruistoj: inter la grandegaj granitaj blokoj, kiuj formas la 118 elegantajn arkojn de la akve-dukto — unu super la alia — tute ne estas mortero! Ilin kunigas nur la koheremo! . . . Ni ne preterlasis fari memorfoton antaŭ tiu unika monumento de la romia konstru-arto. . .

En la urbo nin atendis grupeto da esperantistoj el Segovia, kiuj varme bonvenigis nin. Ni tuj dro-nis en amika etoso, nin superŝutis demandoj pri Bulgario, pri nia E-movado, pri ni mem. . . Poste ni trarigardis la urbon, akompanate de niaj novaj amikoj Cesar de Mosteyrín (72-jara ekspozitisto, kiu havas 8 gefilojn kaj 22 genepojn) kaj Luis Manuel Parra Benito (24-jara oficisto) — ambaŭ paro-lantaj perfektan Esperanto. Mal-graŭ sia aĝo Cesar aspektas tre juna — bonkora, gastama, ĉiam ri-detanta barbulo, pasia biciklisto. Li rakontis al ni, ke pasintjare li vojaĝis per biciklo tra tuta Eŭro-

DANKLETERO EL GDR

Estimata Prezidanto Dălbokov!

Estimataj gekamaradoj kaj geamikoj!

Ni, tri membroj de la Distrikta Estraro en Potsdamo ricevis de via Centra Estraro grandan distingon per Jubilea Ora Medalo „Cent jarojn Esperanto“. Tiu ĉi neatendita estimo vere estas por ni granda surprizo kaj ĝojo. Mi estas komisiita en la nomo de niaj distingitaj geamikoj Brigitte Raabe, Karl Müller, Hanna Scheffs, transdoni al vi nian tre koran dankon.

Tiu ĉi honoro estas stimulo streĉi niajn fortojn.

La sukceso en niaj internaciaj rilatoj, precipe inter la ĝemeldistriktoj Ruse kaj Potsdam, kiuj bone funkcias dum dek jaroj, estas rezulto de la komunaj klopodoj.

Ni tre deziras, ke tiuj ĉi rilatoj plue kresku en la senco de la amikeco, interkompreniĝo kaj komuna strebado por konservi la pacon en la mondo.

La celo devas esti, uzi nian internacian lingvon laŭ multflankaj eblecoj por atingi maksimumajn rezultojn en la kunlaboro.

Ce la sojlo de la nova jaro 1988 ni deziras al vi kaj al ĉiuj Esperanto-geamikoj en Bulgario multajn sukcesojn en la Esperanto-agado kaj en la persona vivo.

Estu paco en la mondo!

Sincere salutas vin

Via Hanna SCHEFFS

VERKO DE BULGARA ESPERANTISTO EN OMAG-LIBRO DE HISPANA UNIVERSITATO*

En la lastaj tagoj de la pasinta jaro aperis luksa eldono de la universitato en La Laguna (Hispanio), omago al la 70-jariĝo de la elstara esperantologo, membro de la Akademio de Esperanto, profesoro Juan Régulo Pérez.

Giaj 790 paĝoj entenas esperantologiajn artikolojn de bone konataj esperantologoj kiel: André Aubaut, William Auld, Marjorie Boulton, Reto Rosetti, Humphrey Tonkin, Gaston Waringhien k.a. Inter ĉiuj ĉi nomoj ni kun fiero trovas la nomon de bulgara membro de la Akademio, la ĉefredaktoro de gazeto „Paco“ Violin Oljanov. Li prezentas sin per rencozo „La Plena Analiza Gramatiko de Esperanto“.

En ĝi V. Oljanov, emfazante la grandan rolon, kiun ludis PAG dum pli ol duonjarcento, detale analizas ĝin, montrante kiel la pozitivajn flankojn, tiel same erarajn punktojn kaj komplikigojn. En sia kritika esploro li tuŝas la demandojn pri la uzitaj terminoj, pri malkonsekvenco de ties uzado, pri miksado de gramatikaj kategorioj, pri la difina artikolo, pri iuj neĝustaj difinoj kaj ekzemploj, pri eraroj, pri preterlasitaj necesaj elementoj, pri la ortografio ktp. Speciale la aŭtoro emfazas la troan komplikigon de la simpla Esperanta gramatiko

Veneta BALEVA

*Serta Gratulatoria in honorem Juan Regulo — eldono de hispana universitato en La Laguna.

po — ĝis Grekio. Tiun vojaĝon li intencas ripeti, sed kun nepra restado ankaŭ en Bulgario!

Ni marŝis laŭ la mallargaj stratoj kaj ĉiupaŝe nian atenton altiris monumentoj el diversaj historiaj epokoj, atestantoj de la regado de visigotoj, araboj, de dinastioj de hispanaj landestroj kaj reĝoj. Preĝejoj en romana, baroka kaj gotika stiloj, ofte miksitaj kun tipe mauraj arkitekturaj elementoj (San Lorenzo, San Esteban, San Juan de los Caballeros) allogas la vizitantojn, kiuj kontemplas ilin, ĝuante la majstrecon de konstruistoj, pentristoj kaj skulptistoj kreintaj unikajn arkitekturajn monumentojn. Niaj ĉiĉeronoj kondukis nin al malgranda placo, kie antaŭ la baziliko de la tempo San Miguel, en 1474, Isabella Katolika estis proklama regino de Kastilio. Multaj el la preĝejoj nun estas artgalerioj kaj muzeoj, konservantaj verkojn de famaj hispanaj artistoj kiel Ignacio Zuloaga, Carlos Muñoz de Pablos, José de Churriguera, Sabatini, Morales, k. a. Certe la Katedralo, la „masto de la ŝipo Segovia“, konstruita en 1525, dominas super ĉiuj aliaj konstruaĵoj de la urbo kaj provokas admiron per sia eleganteco kaj per la beleco de la malfru-gotika stilo. Ĝi plenmerite estas nomita „Reĝino de katedraloj“. Atestanto de multaj dramaj kaj gloriĝaj eventoj el la historio de Hispanio, hodiaŭ La Alcázar estas muzeo kaj milita arkivo. Kun digno kaj fiero la „nazo de la ŝi-


po“ rigardas al la estonto, konsciante sian historian signifon kaj valoron.

Ce sunsubiro, kiam la tuta urbo kvazaŭ flamus sub la lastaj sunradiloj, ni sidis en la korto de malgranda trinkejo ĉe glaso da malvarma bongusta hiero kaj babiladis kun niaj hispanaj amikoj, kvazaŭ ni estus unu rondo familia. . .

Post kelkaj tagoj ni denove estis sur granda aŭtostrado, ĉi-foje direkte al Toledo, en Nova Kastilio, 71 km sude de Madrido. Ĉirkaŭ ni etendiĝis sunbruligita rugkolora tero, kovrita de alta seka herbo. . . Kaptinte mian rigardon, José trankvilige diris: „Printempe, kiam multe pluvas, la pejzaĝo estas tute malsama — la ebenajo similas ondantan verdan maron el tritiko kaj malzo, sed nun. . .“ Kaj li montris la termometron — estis preskaŭ 40°C!

Survoje al Toledo — nenio rimarkinda. Nur tie kaj tie, sur la malaltaj montetoj, ni vidis la minacantan silueton de granda nigra taŭro, kolere hirtiginta, kvazaŭ preta sin ĵeti kontraŭ nin. . . Sed nenio timiga! Evidentiĝis, ke tiu figuro estas nur reklamo al la fama marko de konjako „Osborne“, ĝin oni povas vidi sur ĉiuj aŭtostradoj de Hispanio.

Kaj fine — jen Toledo, la „imperiestra citadelo“ dum dekoj da jarcentoj. De malproksime vidiĝis glaj defendmuroj kaj turoj, amfiteatre surĝimpantaj altan mon-



En Segovia — antaŭ la akvedukto. De dekstre maldekstren: niaj gastigantoj José kaj Lolita Arroyo kaj Cesar Mosteyrin.

ton, domoj el ŝtono kaj bakitaj brikoj — kiel fabela dekoracio. Kaj tiu mirinde bela urbo ĉirkaŭita de la serpentumanta rivero Tajo (Taĥo), ŝajnis vere nekonkerebla citadelo, konservinta la spiriton kaj la etoson de pasintaj jarcentoj. Situantaj ĉe kruciĝo de gravaj vojar-

ZAMENHOF AJ TAGOJ

GABROVO

La 14-an de decembro 1987 la E-rondo en lernejo „Tanja Karpinskaja“ festis la 128-jaran datrevenon de la naskiĝo de d-ro Zamenhof kaj la 100-jariĝon de Esperanto.

Pri la vivo de d-ro Zamenhof, pri la neceso de internacia lingvo kaj pri la Jubilea Kongreso de Esperanto en Varsovio parolis Sonja Tiĥova. La gelnantoj plenumis belartan programon — ili deklamis „Ho, mia kor“ kaj „La vojo“ de d-ro Zamenhof kaj kantis en Esperanto.

Poste Sonja Tiĥova rakontis pri Pollando kaj projekciis filmon.

Gastoj de la Zamenhofa Vespero estis gepatroj, instruistoj, la gelnantoj el la Klubo de Internacia Amikeco, samklasanoj, la prezidanto de DE de BEA ing. Ivan Petrov kaj reprezentanto de E-societo „Verda Torĉo“.

* * *

La 15-an de decembro 1987 la E-kurso en uzino „Tekstilmaŝ“ festis la naskiĝtagon de d-ro Zamenhof kaj la 100-jaran jubileon de Esperanto.

La solenaĵo okazis en la videoklubo de la uzino. Organizantoj estis Maria Ivanova kaj ing. Ĥr. Mandev, kiuj parolis pri la vivo de d-ro Zamenhof kaj pri la 100-jara Esperanto.

Gastoj de la solenaĵo estis la partia sekretario de la uzino Avramov kaj la komerca direktoro Kanev. Ĉe estis la kursanoj kaj reprezentantoj de DE de BEA kaj de UE de BEA.

La prezidanto de DE de BEA ing. Ivan Petrov salutis la ĉeestantojn. La partia sekretario de la uzino Avramov ankaŭ salutis la geesperantistojn.

Fine estis projekciita filmo pri la UK en Pekino. La 16-persona E-kurso en la uzino ekfunkciis la 15-an de oktobro. Ĝin gvidas ing. Ĥr. Mandev.

Ĉe la uzina enirejo Maria Ivanova, per la helpo de Vasil Velĉev, aranĝis vitrinon kun diversaj esperantaĵoj.

* * *

La 18-an de decembro 1987 en la Domo de Kulturo okazis urba kunveno, dediĉita al la 128-a datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof kaj al la 100-jariĝo de Esperanto.

La kunvenon malfermis la prezidanto de E-societo „Verda Torĉo“ Maria Avramova.

Pri la vivo de d-ro Zamenhof parolis Maria Ivanova kaj pri la UK de Esperanto en Varsovio parolis Rumjana Janeva kaj ing. Petrov.

Sonja TIĤOVA

RUSE

La 8-an de decembro pasintjare en la kvartala klubo ĉe strato „Pliska“ 3 kolektigis veteranoj kaj aktivuloj de la komunumoj Ruse, Dve Mogili, Berovo kaj Bjala por digne celebri la 128-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof.

Emocian raporton pri la vivo kaj la granda kreaĵo de Zamenhof faris la esperantisto-aktivulo el Ruse Georgi Venkov. Li substrekis, ke antaŭ la Unua Mond-



Toledo — ĝenerala vidaĵo.

terioj en la Iberia Duoninsulo, Toledo ĉiam estis grava administra, milita kaj komerca centro, en kiu romianoj, visigotoj kaj maŭroj establis siajn imperiestrajn sidejojn, nomis ĝin „reĝa urbo“. Je ĉiu paŝo — romiaj ruinoj, islamaj moskeoj, preĝejoj diversepokaj kaj diversstilaj, kasteloj, kiuj pruvas la mirindan kunekzistadon de araba, hebrea kaj kristana civilizacioj. Toledo estas proklamita Nacia Muzeo-Monumen-

to. En la belega frugotika katedralo princino Juana la Loka (la Freneza) kaj Felipe el Hermoso (la Belulo) estis proklamitaj heredantoj de la Kastilia trono (15-a jarcento). En la „reĝa urbo“ Toledo verkis eminentaj hispanaj verkistoj kaj pentristoj, postlasintaj brillan spuron ne nur en la vivo de Toledo, sed ankaŭ en la hispana kaj monda kulturo: Cervantes, El Greco, Luka Giordano, Goya, Ribera, k.a. Toledo kaj El Greco (Domenikos Theotokopoulos) — la mondfama grekdevena pentristo, estas por ĉiam nedisigebla ligitaj. Alveninta en Toledo en 1577, El Greco donacis al la hispana pentroarto siajn plej belajn verkojn, malkovrinte eĉ la plej kaŝitan ĉarmon de la „reĝa urbo“. Nun lia domo estas muzeo kaj artgalerio, kiu portas lian nomon. Ĝin vizitas miloj da landaj kaj eksterlandaj turistoj, adorantoj de lia arto.

Toledo estas ne nur urbo-muzeo, sed ankaŭ grandega montrofenestro, kiu allogas la vizitantojn per miloj da specifaj toledaj faritaĵoj: ŝtalaj armiloj, kirasoj, tranĉiloj, rapiroj, arbalestoj, ceramikaj, kiujn oni trovas en malgrandaj vendejoj... Kaj — ha! — jen niaj malnovaj konatoj, la hidalgo Donkiĥoto kaj lia fidela servisto Sanĉo Pansa (en natura grandeco), kiuj bonvenigas nin antaŭ magazeno de ŝtalaj faritaĵoj. Dum nia ekskurso tra Toledo mi ĉiumomente

atendis, ke ili aperos malantaŭ iu stratangulo... Do, nun ankaŭ ili ne mankis en la urba pejzaĝo...

Silente ni longe staris antaŭ la muregoj de la urba Citadelo kaj ĉe la monumento de la defendantoj de Toledo, pereintaj en sangoversaj kruelaj bataloj dum la interciivitana milito en 1936... Pasinto kaj nuntempo interplektiĝas en unu tuton — la spirito de fabela Toledo...

ĈE LA MEDITERANEA MARBORDO — EN VALENCIO, GANDIA KAJ DAIMUZ

La furioziĝinta grandega nigra taŭro „persekutis“ nin ankaŭ survoje al la hispana mediteranea marbordo — al Valencio, Gandia kaj Daimuz, kie niaj bonkoraj, gastamaj amikoj proponis al ni kelktagan ripozon. Per siaj oraj strandoj, belegaj kaj relative malmultekostaj ripozdomoj kaj hoteloj, tipa hispana kuirarto kaj multaj distraĵoj, la hispana „Riviero“ allogas milojn da landaj kaj eksterlandaj turistoj.

Kiam nia aŭto surgrimpis la monton Sierra de Malacara, antaŭ niaj okuloj aperis belega vidaĵo: grandega malhele-verda tapiŝo el orangplantejoj, kun brile blankaj kubetoj tie kaj tie sur ĝi — ripozdomoj, vilaoj, hoteloj kaj la larĝa

milito, kiam la suferantaj popoloj kaj la laboristaro bataladis por justo kaj daŭra paco, por laboro kaj digna homa vivo, en 1912 d-ro Zamenhof en sia letero al la Bohemaj laboristoj-esperantistoj en Aŭstrio interalie skribis:

„Por neniu la Internacia Lingvo kaj la esperantismo estas tiel granda graveco, kiel por la laboristaro, kaj por tiuj ĉi idealoj, por kiuj ĝi bataladas“. . . Kaj hodiaŭ la tutmonda laboristaro daŭre bataladas por paco, laboro, pano, libero, por socialismo. Tiel Esperanto servas por la realigo de tiu ĉi noblaĵo celoj.

Sekvis disdono de jubileaj medaloj al veteranoj en la nomo de CE de BEA kaj de la Sekcio de Veteranoj ĉe la Asocio. Danke alparolis Dobri Kolarov, promesante daŭran kontribuon de la veteranoj al nia nobla patriotisma kaj internaciisma afero. Entuziasme estis renkontita la scigo de la direktoro de la ekonomia entrepreno „Esperanto“ Georgi Akalliev, ke omaĝe al la centjariĝo de Esperanto la entrepreno ellaboris bustojn de d-ro Zamenhof kaj ke la esperantistoj el la komunumo de Ruse devas sin prepari por la venontjara inaŭguro de la nun konstruata Komunuma Esperanto-Domo de la Kulturo sur la sama strato „Pliska“

Jordan KALINOV

SUMEN

Junas la esperantista societo „Metalurgo“ ĉe la Sindikata Kulturdomo en la Entrepreno por Prilaborado de Aluminio „Stamen Stamenov“ en urbo Sumen Tradicio estas por ĝiaj membroj omaĝe la datrevenon de la naskiĝo de la aŭtoro de Esperanto.

La 16-an de decembro kolektiĝis la membroj de la societo en la entrepreno manĝejo, kie havis lokon la solenaĵo. Sur aparta tablo estis aranĝita ekspozicio de Esperantaj gazetoj kaj libroj. Tie kuŝis ekzempleroj de „Bulgara Esperantisto“, „Paco“, „Scienca Mondo“,

„Esperanto“ de UEA kaj aliaj renomaj gazetoj. Sian lokon inter la ekspoziciaĵoj deĉe okupis la Unua Libro en pola lingvo, fakvortaroj kaj beletraj verkoj, tradukitaj kaj originalaj.

La sekretario de la societo malfermis la solenaĵon per enkondukaj vortoj kaj substrekis, ke Zamenhof tre zorgeme elprovadis ĉiun elementon de la lingva fundamento kaj ĉiun vorton antaŭ listigo li prononcis laŭte por konvinkiĝi, ke ĝi havas melodian sonadon, ĉar lia muzika sento tion diktis al li. Tial ankaŭ en Esperanto unue estis la parolo kaj nur poste estis la skribo, same kiel en la etnaj lingvoj, kio fakte donis vivipovon al la projekto kaj senmortigis ĝian aŭtoron. Poste ŝi donis la parolon al la prezidanto de la societo ing. Nikolaj Kalev, kiu prezentis raporton pri la jubilea UK, okazinta somere en Varsovio. La membro de la ĝisnuna distrikta estraro de BEA Ilija Andreev memorigis pri la unua lernolibro kaj pri la jam legenda unua internacia konversacio inter L. Zamenhof kaj A. Grabowski. Li ankaŭ enmangis asociajn distingilojn kaj libropremiojn al societaj aktivuloj. La direktorino de la Kulturdomo Emilia Petrova kaj la sekretario de la sindikata entreprena komitato Krasimir Atanasov salutis la ĉeestantojn en la nomo de la kulturdomo, de la sindikata komitato kaj de la administracio, esprimante ilian aprezon kaj admiron pro la sindona kaj persista aktivado de la esperantistoj, promesante estonte pli efike subteni tiun agadon.


Post la oficiala ceremonio sekvis komuna vespermanĝo, tombolo, gajaj amuzoj kaj dancado. Samtage la radioservo en la entrepreno disaŭdigis artikolon pri la festo kaj salutis la esperantistojn per belsona kanto en Esperanto.

Ilija JORDANOV

orkolora rubando de senfina strando laŭlonge de la mediteranea marbordo, kies bluo etendiĝis ĝis la horizonto mem. . . La „blanka ĉefurbo“ de la provinco Valencio kaj ĝiaj satelitoj Torrente, Silla, Sueca kaj Gandia estis ĉe niaj piedoj! . . . Ravite, ni ĝuis tiun mirindan belan pejzaĝon, kvazaŭ ĝi estus miraĝo post la sunbruligitaj dezertaj ebenaĵoj de Kastilio de la Mancha, ĵus traveturitaj de ni. . . En tiu paradizo de la Hispana Riviero, en tiu „alia Hispanio“ ni pasigis kelkajn neforgeseblajn, feliciajn tagojn.

Tamen, eĉ ripozante sur la orsablita strando, sub la ombro de granda multkolora sunŝirmilo, ni kun Josè daŭrigis nian komunan redaktadon de lia esperanta traduko de la romano de Unamuno „Nebulo“. Ankaŭ ĉi-foje ne mankis noblaj kunpuŝigoj pro kreaĵ malsamopinioj, sed tio estis vere agrablaj kaj utilaj disputoj en Esperanto pri Esperanto! . . .

Preskaŭ ĉiutage, antaŭ la sunsubiro, ni faris longajn promenadojn en la oranĝplantejoj. Josè informis nin, ke ĉi tie oni rikoltas oranĝon trifoje dum unu jaro — tiom riĉa estas la grundo kaj favora la klimato — kaj la posedantoj estas veraj riĉuloj. Modesta atesto pri tio



Valencio — urbo-gardeno.

estas la belegaj vilaoj kaj ripozdomoj kun po kelkaj garaĝoj, naĝbasenoj, teniskortoj. . . La Oranĝojn oni rikoltas ne plenumaturaj, observante la eksportkondiciojn, kaj tiuj kiuj falas teren, ne prezentas komercan intereson, ili estas uzataj kiel nutraĵo por la hejmbirdoj. . .

Eĉ meze de septembro la strando de la arkforma golfo de Gandia-Daimuz estis plenplena de feriantoj kaj turistoj — apud ni sunbrulnigadis gaja grupeto da gestudentoj el Capetown (Sud-Afriko). Sur la glataj, bluj, kristale puraj ondoj glitis dekoj da velboatoj, kies multkoloraj veloj similis al flugantaj papilioj. En la ĉielo — eĉ ne unu

nubeto. La termometro tagmeze montris 42°C! . . .

Valencio ravis nin per siaj blankaj, imponaj kaj belegaj diversstilaj konstruaĵoj, per siaj freŝe verdaj parkoj, en kiuj abundas subtropikaj arboj kaj floroj. . . Tria en Hispanio laŭ grandeco kaj administra-ekonomika signifo, Valencio estas nomata la „blanka urbo-gardeno“, en kiu ĉiupaŝe la rigardon altiras ruinoj kaj monumentoj el diversaj historiaj epokoj, intime ligitaj kun la sorto kaj la vivo de la popolo.

Donĉo HITROV
(Daŭrigota)

110 joroj de la Liberigo de Bulgario elsub osmana jugo



Pentristo: Boris Angeluŝev

Aristo RADEVSKI

LA TRIA DE MARTO

Tre ordinara dato.

Kaj ordinara tag'.

Kaj bunta kaj vantema.

Sed en ĉi tiu tag' prempulas nun pli densa,

pli akra la ventego de l'jarcentoj.

Ho, tiu ĉi ventego sanga!

Ĉi tiu hurlo

klakadas kaj lamentas nun en ĉiu lok'.

Odoras je kadavro kaj je fajro —

ĝi venas

el la fundo de infero kvinjarcenta.

Kaj en tiu ĉi tondrad' obtuza aŭdo kiel sonas,

kiel frapas nin la vortoj de Paisij,

kiel kantas tie voĉo de avino Tonka,

kiel Levski konvulsias sub la pendumilo.

Aperas vi sur via sanga vojo

ho, lando de l'suferoj,

Patrujo mia!

en kiu kun egala kredo mortas

homoj simplaj

kaj herooj bravaj.
Praavoj niaj vokas nun en ni,
tondradas la solena himno de la nepoj.
Vi estu preta!

Vi estu vigla!

Komencis ili.

Ni devas finkonstrui!

El la bulgara: S i m a n a n d a

A. M. ARIMA

ZOJA

UNUA „amo“ mia estis Zoja,
knabin' el Moskvo — la ĉefurb' soveta.
Vegetis mi en Bulgaruj' senĝoja,
vagadis senlabora kaj senkreda.

Leterojn longajn verkis mi al Zoja
en la belsona lingvo Esperanto,
kaj eĉ versaĵon sendis al ŝi foje
pri la mizer' reganta en la lando.

Respondis Zoja proksimume jenon:
„Neniu ĉe ni vartas nigrajn pensojn;
pri la jarkvinoj zorgas rus', armeno,
kazaho, ukrainano el Odeso.“

Ŝi pentris vorte bildojn el la vivo:
pri novaj homoj — Paŝa Angelina,
pri Staŝanov kaj lia kolektivo,
pri Kuzbas, Turksib kaj Dneproturbinoj.

Per iu poŝta karto ŝi invitis:

„Veturu al Moskva kaj studu ĉe ni:
abundas altlernejoj en Tbilisi,
en Leningrado, Harkov kaj en Kiev.“

Ne povis mi vojaĝi per pasporto —
ekflamis la milit' antisoveta.

Kelkfoje mi evitis tujan morton
dum batalado en geril' kruela.

Englutis milionojn homovivojn
la sangavida Marso kun svastiko.
Revenis hejmen pac' sur tera globo
kaj eksilentis la armilfabrikoj.

Pro kio Zoja daŭre jam silentas?
Verŝajne iris ŝi al front' volonte;
flegante kamaradojn sub la tendo
Obuso blinda trafis ŝin dumnokte. . .

Al kara Zoja restas mi fidela.

Ja ŝi etendis manon al poeto
kaj gajnis koron mian por sovetoj —
potenca land', de l'paco Citadelo!



Pentristo: Zdravko Zaŝariev

virina verkaro

Inita TAMOŠIUNIENE

PATRINOJ DE FILOJ

Senzorge dormetas en siaj luliloj
Aŭ gaje kuregas en kort' niaj filoj.

Konstruas el sablo grandegan palacon
Aŭ ludas militon... konante nur pacon.

Mi timas. Atentu, patrinon de filoj:
Tro plaĉas al knaboj ludad' kun armiloj.

Sed dume en multaj anguloj de Tero
Pro veraj militoj tremegas aereo.

Ĉu vin, ho patrinon, ne maltrankviligas
La sorto, por kiu ni filojn kreskigas?

Abundis militoj dum longaj jarmiloj.
Lamentis ĉe l' tomboj patrinon de filoj—

De filoj, kreskigitaj kun am' kaj espero.
Plenfortaj kaj junaj. Kuŝantaj en tero.

Patrinon de filoj — soldatoj estontaj!
Patrinon de eblaj militbatalantoj!

El tuta homaro sur Tero grandega
Vi certe militon plej forte timegas.

Gis Teron ĉirkaŭas milita minaco
Senĉese,
obstine

Batalu por paco!

Kaj certe vi venkos, se nur unuiĝos...
Mi havas du filojn.
Mi ankaŭ aliĝos.

Liljana STEFANOVA

BULGARLINGVE

Fortega, arda, primavera,
vekiĝis de la dorm' Rusio...
glacion rompas Neva-rivero,
tempestas laboristmedio.

Kaj en la ĉambr', ĉe samovaro,
kantanta sian grumbkanteton,
parolis flame homa paro...

— En mia lando, — diris unu, —
kreskadis vicoj laboristaj, —
bulgaran nian proletaron
teruroj, kugloj ne timigos...
Aŭskultis Lenin karan gaston,
lin frate kuragiĝis

per rideto
kaj regalante per aroma te',
demandis:
— Ĉu povus vi por mi prizorgi
ion:
rusan-bulgaran vortareton?...

...Tra rusaj valoj kaj grenkampoj
kruelaj marŝis invadantoj,
sed spite al ruinoj, plagoj
Lenin jam tiam vidis

en la foro:
en mia Bulgario — venko,
la ruĝruband' — sur la kaskedo,
bajonetoj,

kaj li salutis —
kore, frate —
popolon mian —
bulgarlingve.

Esperantigis: Nadija ANDRIANOVA

LA 8-A DE MARTO — INTERNACIA VIRINA TAGO



Ema JONĈEVA

FLOROJ EL ROZKOLORA KRETO

Miniaturon

Tra la fenestro mi rigardis infanon — knabineton,
kiu pentris sur la nigra strata asfalto. Unu post alia
elkreskis floroj kun rozkoloraj pedunkloj kaj floroetoj.
Fantazia fresko el kreto!...

Kiam la kreto finiĝis, la knabineto ekiris. Sed bal-
daŭ ŝi revenis kaj komencis forviŝi la florojn. Mi ne
denis min kaj petis ŝin lasi ilin. La knabineto daŭri-
gis sian laboron, klarigante al mi:

— Ja iu kamiono povus surveturi ilin! Nepre ĝi
surveturos ilin. Kaj poste, kiu estos kulpa?...

— Aha!...

Nenion plu mi havis por diri. La floroj estas ŝiaj.
Ŝi rajtas gardi ilin. Eble tio estas la respondec, kiun
Exupéry provis sugesti al la homoj, antaŭ ol perei
kun sia aviadilo?!

— La floroj sentas sin plej bone en la ĝardenoj... —
aldonis la knabineto. — Tie la ŝildetoj kun surskribo
„Ne pluku la florojn — ili estas viaj!“ — gardas
ilin.

— Aha!

La eta pentristino foriris. Ŝi gaje saltetis. Sur la
nigra asfalto restis la rozkolora nubeto de la kompati-
taj kretfloroj.

Mi rigardis la nubeton pensante: En ĉiu ĝardeno
estas ŝildetoj kun surskribo „Ne pluku la florojn! Ili
estas viaj!“. La floroj estas defendataj. Ili ne songas,
ke pezaj kamionaj pneŭmatikoj surveturos ilin.

Sed kial la infanoj sur nia tergloba devas songi
atakojn de bombŝarĝitaj aviadiloj?!

El la bulgara: Lilija KOLEVA

MARTENICOJ EN MONGOLIO



№29(3701)

1987 оны дөрөвдүгээр сарын

20

Даваа

38 дахь жилдээ

Үнэ 15 мөнгө

ХАВРЫН БАЯРЫН БИЛЭГДЭЛ

Эртний Болгар, гүрнийг үнэ дэслэгч Аспарух ах Баян эгч Хуба нарыгаа, аврахын тулд хөлд нь цагаан утас уясан бүргэд илгээжээ. Харгис Ашин хааны нутгаас оргож явсан Баян дайсны суманд өргөж шувуунаас тайлж авсан утсыг цус болгожээ. Аспарух утсыг хэсэглэн хувааж цэргүүддээ хувцсандаа хадаг тушаал өгчээ гэсэн домгоос үндэслэн Болгарчууд хаврын баяраар улаан цагаанаар нийтгэсэн утсыг аз жаргал, өрүүл энхийн билэгдэл болгон энгэртээ зүүдэг заншилтай болжээ.

Ж.Магсаржав.

Nia korespondado kun la aktiva mongola amiko Jamsijgin Magsarjav el la urbeto Ondorhaan, situanta 200 km for de la ĉefurbo Ulan-Bator, estas longjara, interesa kaj utila. Profesie li estas konstruteknikisto, nun estro de la konstrua fako de la Oficejo de la agrikulturaj kooperativoj en la ajmako (distrikto) Hantij. Regule miaj kaj liaj leteroj trafugas la malproksimajn distancojn kaj ligas nin per

sincera amikeco. Mi kaj li regule interŝanĝas informojn pri la vivo kaj atingoj de l'socialismo en niaj amikaj landoj, pri niaj kaj iliaj festoj, kutimoj kaj moroj.

Jam multajn jarojn por ĉiu unuamarta festo, mi rapidas ĝustatempe sendi al mia amiko kaj al liaj familianoj bulgaran „Martenica“, bondeziri al ili, laŭ nia antikva kutimo, longan vivon kaj sanon, multe da brutaro — plej grava branĉo de la Mongola ekonomio. La unua „martenica“ mirigis ilin, sed ili ĝin admiris. Mia amiko dankis pro la surprizo. Li interesiĝis pri la deveno kaj la signifo de tiu unika kutimo, pri la amo de nia popolo al niaj tradicioj.

Antaŭ unu jaro mi sendis kune kun la tradicia „martenica“ ankaŭ la tekston de „Legendo pri la „martenica“, kies aŭtoro estas la verkisto Vasil Stanilov. Ĝin esperantigis la aktiva ŝumena esperantisto Ilija Andreev.

Nun — antaŭ la nova unuamarta festo, mi kaj ĉiuj ŝumenaj esperantistoj travivis grandan gojon. Kial? Ĉar antaŭ nelonge mi ricevis №29de la ĵurnalo „Uragšaa“ — organo de Hantij-ajmako. Sur ĉefa loko estas publikigita parto de nia prabulgara legendo. Ĝin tradukis en la mongolan lingvon mia kara amiko Magsarjav. Nun en malproksima amika Mongolio jam multaj homoj, dank' al la internacia lingvo, scias ne nur pri la bulgara „martenica“, sed ankaŭ pri niaj popolo kaj historio.

Cvjatko TODOROV

ZORGOJ PRI E-DOKUMENTOJ

Jam de multaj jaroj en la Filio de la Ŝtata Arkivo en Ŝumen estas zorgeme konservataj ĉiuj valoraj dokumentoj, litigitaj kun la ekapero kaj jam pli ol 80-jara historio de la E-movado en Ŝumen kaj la Ŝumen-regiono. La pliparto el ili estas gravaj protokoloj, malnovaj membronomaroj, jarraportoj, malfermitaj alvokoj de ŝumenaj esperantistoj al la monda esperantistaro defende al la paco, korespondadoj de societo „Vekiĝo“ ekde ĝia fondiĝo en januaro 1905 ĝis nun. Multaj el tiuj dokumentoj estas interesaj ne nur por la historio de Esperanto, sed ili prilumas ankaŭ la ĝeneralan evoluon de la kultura-kleriga agado en Ŝumen kaj en nia lando.

Ci tie oni konservas la personan arkivon de la elstara ŝumena demokrato kaj sociaganto, fondinto kaj multjara prezidanto de „Vekiĝo“, la eminenta bulgara esperantisto Ilija Silvestriev. Tre valora donaco estas la arkivo de la honora membro de BEA, la batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo Atanas Bojaĝiev, en kiu estas multaj dokumentoj atestantaj pri lia aktiva agado en la Labosista E-unuiĝo kaj pri lia amikeco kun geesperantistoj el USSR, Germanio, Francio dum la tridekaj jaroj. El ĉiuj tiuj materialoj estas kreita arkiva fako „Esperanto“, kiu estas protektata de la ŝtato.

La oficistoj en la Arkivo kaj la direktoro Stojan Borisov rilatas favore al Esperanto kaj speciale zorgas ne nur pri la esplorado, prilaborado kaj konservado de la E-arkivo, sed ankaŭ pri popularigo de Esperanto. Esprimado de tiu zorgo estas la publikigo en la eldonata oficeja „Jarlibro“ de iuj rimarkindaj datoj kaj eventoj el la historio de „Vekiĝo“. Antaŭ nelonge eksperta komisiono, konsistanta el oficejaj specialistoj kaj membroj de la societa estraro, prilaboris la arkivon de la societo, koncernantan la periodon 1973—1983. La farita laboro estis prijuĝita kaj aprobita dum oficeja kunsido Tiamaniere fako „Esperanto“ estis denove pliriĝigita, por esti utila al ĉiuj interesuloj kaj al la estontaj generacioj.

Cv. STOJANOV

MATERIALOJ PRI EROŜENKO SERĈATAJ

Cukotka Esperantista Ligo laboras por nia movado en la plej nord-orienta anguleto de Azio, sur duoninsulo Cukotka. En ĉi-loko dum 1929/1930 jaro vivis la fama Vasilij Eroŝenko, blinda rusa esperantisto, kiu samtempe estas klasikulo de la japana literaturo. Pri tio oni povas legi en du biografiaj libroj pri Eroŝenko: ukrain-lingva „Ekbruligis mi en koro la ardon“ de Nadija Andrianova kaj rus-lingva „La homo, kiu vidis la mondon“ de Aleksandr Harkovskij. La estraro

de Cukotka-E-Ligo decidis organizi en almenaŭ du muzoj de la Cukotka Aŭtonoma Nacia Distrikto ekspoziciojn pri nia fama samlandano V. Eroŝenko. Unu el tiuj muzeoj — en la ĉefurbo de Cukotka, Anadyr, estas ŝtata, kaj la alia — en urbeto Egvekinot, estas publika.

Do, ni petas ĉiujn esperantistojn, kiuj posedas materialojn pri Eroŝenko, sendi ilin por la estonta muzea ekspozicio laŭ adreso: USSR, 686810 Magadan-provinco, pos. Egvekinot, ab/k 22. Prisiajjuk Ivan Iliĉ.

UNUA KONGRESO DE KUBAJ ESPERANTISTOJ

La 4-6. XII. 1987 en la ĉefurbo de Kubo Havano okazis la Unua Kongreso de Kubaj Esperantistoj. En la kongresejo — la salono de teatro Mella, ĉeestis pli ol 1000 delegitoj kaj kvar alilandaj gastoj: Simo Milojević — ĝenerala direktoro de UEA, Otto Haszpra — estrarano de UEA, d-ro Detlev Blanke — ĝenerala sekretario de GDREA kaj Marin Băcev — ĉefa metodikisto de CE de BEA.

La solena inaŭguro komenciĝis per la nacia himno kaj per prezento de la oficialaj personoj kaj de la alilandaj gastoj. Sekvis salutparoloj de la gastoj. La veterano-esperantisto kaj iama multjara ĉefdelegito de Kubo, nuntempe prezidanto de la Komisiono pri Historio de Kubo, Raúl Juanez Seden, prelegis pri la Esperanto-movado en la lando. Poste la ĝisnuna prezidanto de KEA Jesús Castillo faris raporton pri la agado de KEA dum la lasta periodo. Sekvis viglaj diskutoj. Per la Esperanto-himno „La Espero“ la solena inaŭguro finiĝis.

En la fumsalono estis aranĝita interesa ekspozicio: esperantaj libroj, fotoj kaj filatelaĵoj el la vivo de kubaj esperantistoj. Funkciis stando por vendado de Esperantaj libroj, insignoj, esperantaĵoj.

Posttagmeze laboris kvar komisionoj: pri instruado, informado, kulturo kaj scienco/tekniko. La laborkunsidoj de la komisionoj okazis en la belegaj salonoj de la Kuba Akademio de Sciencoj. Ni partoprenis la kunsidon de la komisiono pri instruado. Al la delegitoj el la apartaj provincoj oni disdonis labordokumentojn kaj oni pridiskutis metodikajn kaj organizajn problemojn. Mi kelkfoje esprimis mian opinion kaj respondadis al direktitaj al mi demandoj.

Vespere en la Muzeo Maximo Gomez estis malfermita ekspozicio de infandeseĝnaĵoj, kiun ĉeestis multaj kongresanoj kaj ankaŭ ni, la eksterlandaj gastoj. Poste ni estis invititaj al vespermango en Hotelo „Riviera“.

La 5-an de decembro antaŭtagmeze en la tagordo estis prelegoj de la eksterlandaj gastoj. Prelegis Otto Haszpra („Nova Barajsistemo sur rivero Danubo“), Marin Băcev („Instruado de Esperanto en Bulgario“) kaj Detlev Blanke („Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado“). Post ĉiu prelego sekvis viglaj diskutoj kaj demandoj, al kiuj la prelegintoj detale respondadis.

Sekvis kultura aranĝo: estis prezentitaj kubaj polaj dancoj kaj kantoj.

Posttagmeze estis vizito al ornitologia ekspozicio, kie la eksterlandaj gastoj estis agrable surprizitaj: ĉiu el ili ricevis kiel donacon po unu kanarion, kun la peto kontakti la kubajn esperantistojn-ornitologojn kun alilandaj ornitologoj. Vespere okazis amika renkontigo de kongresanoj kun la eksterlandaj gastoj en la subĉiela restoracio de hotelo „Itabo“, ekster la urbo, kie ĝis la noktomezo, sub la sonoj de temperamento kuba muziko, daŭris la kontaktoj en amika etoso.

La 6-an de decembro okazis la solena fermo de la kongreso. Denove ĉiuj delegitoj kaj gastoj kolektigis en la feste ornamita salono de teatro Mella. Denove eksonis la Nacia Himno. Unue estis tralegita la Laborplano de KEA por la sekva laborperiodo, poste — la rezolucioj de la Komisionoj. Sekvis disdono de diplomoj al personoj sukcese finintaj Esperanto-kursojn kaj distingo de Esperanto-instruistoj kaj aliaj aktivuloj. Poste oni prezentis la liston de la nova Estraro de KEA: Jesús Castillo — prezidanto; Julian Hernandez — vicprezidanto; Andres Pina — sekretario pri instruado; Maritza Gutierrez — sekretario pri propagando; Alberto Fernandez-Galiens — sekretario pri internaciaj rilatoj; Martin Castro — sekretario pri kulturo; Francisco Briel — sekretario pri organizaj aferoj; Ismael Sotolongo — sekretario pri financoj.

La nove elektita prezidanto de KEA faris mallongan festan parolon lige kun la antaŭstarantaj taskoj de KEA. Poste oni tralegis la Kongresan Deklaracion.

Fine la opera kantistino-esperantistino Maria Esther Perez ĝuigis la kongresanojn per bukado el belsonaj operaj melodioj, kiujn ŝi kantis en Esperanto. . .

Per la Esperanta Himno „La Espero“ estis fermita la Unua Kongreso de Kubaj Esperantistoj, kiuj ĝoje bonvenigis la eksterlandajn partoprenantojn en la Universala Kongreso de Esperanto en Havano 1990.

Havano — Sofio
januaro 1988

Marin BĂCEV,
Elstara Lektoro de Esperanto

„Esparol“

En la Budapeŝta Teknika Universitato esploristoj ellaboris la aŭtomatan sintezon de Esperanto. La sistemo ESPAROL povas eldiri kun konvena intonacio ĉiujn esperantajn tekstojn skribitajn laŭ la normala ortografio; ĝi prononcas ankaŭ numerojn kaj aliajn specialajn signojn trovigantajn sur la klavaro (=, +, %, ktp.).

Per simpla programo en la programlingvo BASIC oni povas voĉigi pli longajn tekstojn ankaŭ kun variabloj; paroligi la maŝinon diversrapide flustre aŭ raŭke, eĉ eblas enprogrami kantojn.

La sistemo konsistas el aparato konektebla al mikrokomputo Commodore '64 aŭ '128 kaj el programo sur disketo. (Tiu ĉi tuto estas nun ekvendata kontraŭ

350 DM*). La varianto por IBM persona komputilo kaj al ĝi kongruaj stas evoluigata. (La enmetebla karto kun programo koston ĉ. 550 DM). Laŭ nia scio ESPAROL estas la unua parolsinteza produkto por vaste uzataj mikrokomputoj.

La sistemon eblas konekti kun optika legilo ellaborita en la hungara komputika esplorinstituto SZKI. Tiel malbone vidantaj aŭ okupitaj homoj povas aŭskulti komputile laŭlegitajn tekstojn.

La evoluigantoj de ESPAROL Ilona Koutny, d-ro Gábor Olasz kaj d-ro László Czapp laboras nun pri aplikoj kun studentoj. Pretigas parolanta instruprogramo por Esperanto kaj ludoj uzeblaj en instruado. Ĝi povas servi ankaŭ en la provlegado de komputile kompostitaj tekstoj.

Ĉiu uzanto mem povas fari simplajn Basic programojn por utiligi la parolkapablon laŭ siaj deziroj.

Pluaj informoj ĉe I. Koutny (Budapeŝta Teknika Universitato, Budapest, Stoczek u. 2, H.-1111).

*En Hungario c. 7000 FT.

EMINENTA SCIENCISTO-ESPERANTISTO

(Okaze de la 90-a datreveno de la naskiĝo de akad. Donĉo Kostov)

Dank' al la rezultoj de siaj multnombraj precizaj kaj fundamentaj sciencaj esploroj en la sfero de genetiko, citogenetiko kaj filogenetiko de la specoj de genro Nicotina (Tabako), rilatantaj ne nur al la tabakplantoj, sed ĝenerale al ĉiuj plantoj, la bulgara sciencisto akad. prof. d-ro DONĈO KOSTOV (1897—1949) viciĝas inter la plej eminentaj sciencistoj-biologoj en la mondo.

Fininte la agronomian fakultaton en Hale (Germanio), kie li aktivis ankaŭ en la tiea studenta es-

perantista societo, li komencis sian sciencon agadon en la agrikultura esplora stacio en la regiono de la apudnuba urbo Ruse, kaj samtempe instruis en la tiea meza agrikultura lernejo, por kies lernantoj li gvidis kurson de Esperanto.

Dum tri jaroj li laboris en la universitato en Harvard (Usono), kaj poste — pli ol 7 jarojn en Sovetunio, kiel kunlaboranto de la granda rusa sciencisto akad. N. J. Vavilov, kiel profesoro en Leningrada universitato k. a.

Post sia reveno en Bulgario, pro kontraŭstaro de la burĝa profesora konsilio en la Agronomia fakulta-

to, li ne ricevis la meritan profesoran postenon, tamen li estis oficigita de la Ministerio de Agrikulturo kiel direktoro de la Centra Agrikultura Esplor-sciencia Instituto. Samtempe la eminenta kreinto de la instruoj pri stimulado de la organizmoj prof. Metodi Popov siaflanke disponigis al D. Kostov lokon de profesoro ĉe sia katedro en la Medicina Fakultato. Post la venko de la socialisma revolucio (9. 9 1944) D. Kostov prelegis en la Agronomia Fakultato pri darvinismo, genetiko kaj selektado de la plantoj, kaj en 1946 li estis elektita regula membro de la Bulgara Akademio de Sciencoj. Li estis membro ankaŭ de aliaj akademioj, multnombraj sciencaj institutoj, organizaĵoj k. a.

La 9. VI. 1949 akad. Donĉo Kostov forpasis en la 52-a jaro de sia fruktodona vivo.

Prof. d-ro Miĥail D. POPOV

UNU EL LA PIONIROJ ...

(Lige kun la 80-jara datreveno de la morto de Krăstju Krăstev)

Krăstju Jordanov Krăstev estas unu el la pioniroj de Esperanto post 1900 jaro, kiam aperis „Plena manokonduko por ellernado de la lingvo internacia Esperanto“, de Hr. Popov kaj G. P. Oreškov — Plovdiv.

K. Krăstev estas naskita la 31-an de julio 1878 en vilaĝo Polsko Kosovo, regiono de Ruse. Ĉi tie li finis la elementan lernejon dum 1888/89. Dum 1895/96 li finis la kvaran klason (nun VIII) de la Ŝtata Knaba Gimnazio „St. Kiril kaj Metodij“ en Veliko Tărnovo. Li estis bonega lernanto. Post la gimnazio li estis oficigita kiel skribisto ĉe la komunumo en sia naskiĝvilaĝo, poste kiel oficisto ĉe la

Bulgara Agrara Banko en urbo Bjala (1897).

En 1901 (la 16-an de oktobro) li aĉetis la lernolibron „Plena manokonduko...“ kaj komencis tre fervore lerni Esperanton. Kiam li lernis la lecionojn li skribis la novajn vortojn en malgranda kajero. Li estis arda adepto de la lingvo kaj jam ricevis la bulgaran-esperantan gazeton „Rondiranto“ Tiam Krăstju Jordanov estis oficisto en urbo Kula. Dum novembro li jam skribis esperante al s-ro A. B.: „Estimata sinjoro“, multe mi dankas vin pro la karteto kaj pri la propono daŭrigi la interŝanĝadon de ilustritaj poŝtkartoj... Mi dankas vin pro la libreto „Per la vidaĵkartoj“, kaj mi sendas al vi tiun ĉi karteton, kun vidaĵo de la rusa sanktejo apud vilaĝo Ŝipka per la ekspozicio espe-

ranta. Salu(ton)!” Novembro 11/12 Kula — Bulgario, K. Jordanov“.

Tiu bona esperantisto estis ankaŭ bonega sociiganto kaj ŝatis la literaturon. Jam en 1899 kune kun iuj instruistoj el la vilaĝo li fondis la popolan legejon „Razvitiie“ — (Evoluo) kaj li donacis al ĝi multe da libroj. Poste, en 1906 kune kun aliaj samvilaĝanoj li fondis kreditan kooperativon „Sălasie“ (Konkordo). Ĉiuj en la vilaĝo amis kaj estimis tiun bonan homon, ĉar li laboris por la vilaĝo kaj por la socio.

La legejo kaj la kooperativo ankaŭ nun ekzistas kaj vige aktivadas.

K. Jordanov revenis en urbon Bjala. En 1905 li estis sendita kiel aganto de Bulgara Agrara Banko en vilaĝo Kacelavo, regiono de Ruse, kie la 17-an de januaro 1907 li tragiĝe pereis.

Estu eterna lia memoro!

Jordan J. ATANASOV

REZULTOJ DE LA KONKURADO EN BEA

En sia kunsido okazinta la 7-an de decembro 1987 la Buroo de CE de BEA aprobis la raporton de la Komisiono pri Konkurado inter la societoj, sekcioj, lernejanaj grupoj kaj distrikta estraroj honore al la 100-jariĝo de Esperanto. Ĉi-sube ni publikigas la decidon de la komisiono. Venkintoj en la konkurado estas jenaj societoj:

I. Teritoriaj societoj:

1. „Maksim Gorkij“ — Jambol
2. „Verda Torĉo“ — Gabrovo
3. „Ivan Krăstanov“ — Sofio

II. Profesiaj societoj

1. „Diĉo Petrov“ — Sofio (instruista)
2. „Hristo Botev“ — Sofio (fervojiŝta)
3. „Fluganta Letero“ — Veliko Tărnovo (poŝtista)

III. Oficejaj societoj (kuraĝigaj premioj):

1. „Stefan Minkov“ — Razgrad
2. „Samanta Smith“ — Sofio

IV. Lernejanaj grupoj (kuraĝigaj premioj):

1. „Rideto“ — Tărgovište
2. „Ljuben Karavelov“ — Koprivŝtica
3. „Vâlko Radinski“ — Botevgrad

V. Sekcioj:

1. Medicina sekcio
2. Poŝtista sekcio
3. Junulara sekcio

VI. Distrikta estraroj:

1. Sofio — distrikto
2. Sofio — urbo
3. Burgas

VII. La Redakcio de „Bulgara Esperantisto“ — pro plena kaj aktuala prezento de la 100-jara jubileo de Esperanto per originalaj materialoj el la vivo kaj la agado de la E-societoj en la lando, estas distingita per jubilea flago kaj medalo.



NACIA FERVOJISTA KONFERENCO

La 31-an de oktobro 1987 en Varna okazis la VII konferenco de fervojistoj-esperantistoj en Bulgario. Partoprenis reprezentantoj de ĉiuj fervojistaj esperantistaj societoj en la lando, gastoj el la Centra Estraro de BEA kaj el fremdlando.

La konferenco pasis en amika kaj afereca atmosfero. Per la raportoj de societaj prezidantoj la partoprenintoj estis informitaj pri la ĉiufanka agado de ĉiu aparta societo. Petranka Lalova — prezidantino de societo „Hristo Botev“ ĉe la Ministerio de Transporto prelegis pri la okazinta en Pollando kongreso de IFEF en majo pasintjare kaj pri la 72-Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio.

Sv. Manev kaj A. Maglov prezentis du prelegojn pri fervoja temo.

La reprezentanto de CE de BEA Georgi Dolapčiev enmanigis medalojn „100 jarojn Esperanto“ al fervojistoj-veteranoj kaj aktivuloj.

Rajna VÄLKÖVA

VALORA EKSPOZICIO

En la lastaj tagoj de la pasinta jaro al la multnombraj iniciatoj dediĉitaj al la 100-jara jubileo de Esperanto aldoniĝis ankoraŭ unu E-arango. De la 17-a ĝis la 27-a de decembro en la grandega atendejo de la Centra Stacidomo de Sofio estis organizita ekspozicio „Esperanto en filatelo kaj filokartio“. Ĝiaj organizantoj estis CE de BEA kaj la Sekcio de Filatelistoj kaj Kolektantoj ĉe BEA.

La ekspozicion solene inaŭguris prof. d-ro Kiril Popov — prezidanto de la Urba Estraro de BEA. Honoraj gastoj estis Hristo Nikolčev — ĝenerala sekretario de la Bulgara Filatelista Asocio, kaj Grigorov — ĝenerala sekretario de la Societo de Numismatoj.

Tiu imitinda iniciato estas rezulto de la trijara abnegata laboro de Georgi Litov — elektroteknikisto ĉe la entrepreno Bulgaraj Stataj Fervojoj, prezidanto de la Sekcio de Esperantistoj-Fervojistoj ĉe BEA. Li estas unu el la plej konataj bulgaraj esperantistoj-kolektantoj. La materialojn por la ekspozicio li kolektis dank' al la helpo de bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj. Post la fermo de la ekspozicio la ekspoziciaj estis transdonitaj al la Bulgara Esperanto-Muzeo.

Jam longajn jarojn daŭras la fruktdona eksterlanda leteramikeco de Georgi Litov. Fruktodona, ĉar tiu amikeco helpis al hispana samideano Adonis Gonsales Meana, kiu, pro serioza malsano — paralizo de ambaŭ kruroj, estis tute senkurigita. Dank' al sia bulgara amiko li denove revenis la movadon, post tralego de la libro „Mia Vivo“ de Trifon Hristovski. Dank' al libro sendita de Litov aŭstralia esperantisto konatiĝis kun la fama bulgaro Georgi Dimitrov.

Litov aspektas ordinara homo — kiel ĉiu el ni, sed lia agado ne estas tute ordinara. Lia mirinda laboremo ĉiam puŝas lin al novaj ideoj. Okaze de la centjara jubileo de Esperanto li turnis sin kun alvoko al ĉiuj siaj amikoj en la vasta mondo helpi lin por plenumi specialan ideon. Lia revo estis prezenti ekspoziciojn, tuŝante kelkajn temojn koncerne Esperanton kaj la

jubileon. Pli ol unu jaron Litov kolektis valoraĵojn kaj kiel jam estis menciite, la 17-an de decembro pasintjare en la salonego de la sofia stacidomo ni ĝuis tiun unikan ekspozicion. Sur 18 tabuloj estis prezentitaj ĉirkaŭ 900 ekspoziciaj — poŝtkartoj kun portretoj de d-ro Zamenhof, eldonitaj okaze de UK kongresoj, datrevenoj k. a.; bildkartoj kun vidaĵoj el urboj, en kiuj okazis Universalaj Kongresoj; unikaj esperantaj poŝtmarkoj, poŝtmarkoj dediĉitaj al la 100-jara jubileo kaj multaj aliaj materialoj pri Esperanto kaj pri la esperantista pacagado, eldonitaj en pluraj landoj.



Georgi Litov kun vizitantoj de la ekspozicio.

Kial Georgi Litov sukcese realigis sian ideon pri tiu granda kaj tre grava jubilea ekspozicio? Kio helhis lin? Antaŭ ĉio lia altnivela korespondado, liaj obstineco kaj mirinda laboremo. Ni ne devas preterlasi ankaŭ la helpon de lia milda zorgema edzino Vanja. En la vivo de tiu geedza paro mankas enuo, vanaj pensoj kaj agoj. Ĉio estas bone planita, strikte plenumata. Ili estas inter ni senbrue kaj konstante fosas sian sulkon en la larĝa E-kampo, kontentigante samtempe ankaŭ sian internan estetikan bezonon.

Zora OŜANSKA
Daniela IVANOVA

SOLENA KUNVENO

La 25-an de decembro pasintjare en la salono de legejo „Iskra“ en Sofio estis organizita solena kunveno de E-societo „Nikola Sopov“. La solenaĵo estis dediĉita al la 100-jara datreveno de la internacia lingvo Esperanto, al la 80-jariĝo de Bulgara Esperantista Asocio kaj al la 25-jara jubileo de fondo de la societo.

La kunvenon ĉeestis la ĝenerala sekretario de CE de BEA D. Papazov, prof. d-ro Kiril Popov — membro de la Buroo de CE de BEA, veteranoj-esperantistoj — membroj de la societo ekde ĝia fondiĝo. Partoprenis ankaŭ multaj civitanoj, ĝejnuloj kaj lernantoj, kiuj lernas la Internacian Lingvon.

La solenajn gvidis la veterano-esperantisto Todor Oŝanski. Per belarta programo en Esperanto la ĉe-

tantojn salutis junpioniroj el 45-a elementa lernejo „Konstantin Veličkov“.

En sia raporto la prezidanto de la societo Ljuban Grozdanov parolis pri la vojo, trapasita de la societo, dum 25 jaroj, pri ĝiaj sukcesoj kaj malfacilaĵoj. Dank' al la sindona kaj senlaca laboro de siaj membroj de malgranda faka societo de laboristoj ĉe uzino „Kliment Vorŝilov“, societo „Nikola Sopov“ transformiĝis en unu el la plej aktivajn sofiajn societojn.

Prof d-ro K. Popov direktis varmajn salutvortojn al la societanoj okaze de ilia jubileo.

Multaj membroj de la societo — aktivuloj kaj veteranoj, estis honorigitaj per la jubilea medalo „100 jarojn Esperanto“, per libroj kaj floroj. Gelernantoj el la E-kursoj plenumis literaturan-muzikan programon.

Maria SLAVČEVA

CELEBRADO EN KOPRIVŠTICA

La 31-an de oktobro kaj la 1-an de novembro pasintjare en la bela urbo Koprivštica estis organizita celebrazo de la 100-jara datreveno de Esperanto.

La kunveno havis grandan signifon por la estonta patriotisma kaj internaciisma edukado de la esperantistoj el tiu regiono. Ĉeestis reprezentantoj de la Urba Estraro kaj de la publikaj organizaĵoj. Parolado, dediĉita al la jubileo faris N. Dobrikova — prezidantino de la E-societo en Koprivštica. La celebradon partoprenis ankaŭ Georgi Miĥalkov — reprezentanto de CE de BEA. Li prelegis en Esperanto pri la vivo kaj agado de d-ro Zamenhof. La celebradon partoprenis esperantistoj el preskaŭ ĉiuj E-societoj de la distrikto de Sofio.

Lernejana grupo el urbo Elin Pelin sub la gvido de Ivanka Boŝnakova plenumis interesan programon.

Aktivuloj kaj veteranoj el la distrikto estis distingitaj per jubileaj medaloj pro ilia fervoro en la E-agado.

NIA FESTO

Varmeta posttagmeza suno karesis la multkolorajn bildojn de la jubilea ekspozicio. La belege ornamita scenejo plezurigis la okulojn. Bruis la plenplena sole-nego. Polski Trâmbes amase festis la gloran jubileon de Esperanto. . .

La solenaĵon ĉeestis prof. d-ro Kiril Popov — membro de la Buroo de CE de BEA, lokaj sociagantoj, de-koj da geesperantistoj el pluraj loĝlokoj, veteranoj, multaj geurbanoj.

Krâstinka Dimitrova — vicprezidantino de E-societo „Hristo Kozlev“ malfermis la vesperon de paco kaj amikeco, dediĉitan al Esperanto, kaj donis la parolon al Hristo Manolov. La konciza, sed informriĉa raporto memorigis la vojon de la monda, enlanda kaj urba E-movado. Interesaj estis la prezentitaj faktoj pri la 30-jara aktiveco de la loka E-societo: vigla korespondado kun kluboj kaj esperantistoj el pli ol 40 landoj; fakultativa instruado de Esperanto ekde 1957; multjara redaktado de internacia ĝelernanta gazeto, presata en Polski Trâmbes; interesaj tradiciaj ekspozicioj rezulte de reciproka interŝanĝo; utiligo de Esperanto por tute praktikaj celoj. La vigla internacia kaj porpaca agado de la societo, ĉiam efektivigata kunlabore kun la loka Porpaca Komitato kaj aliaj amasorganizaĵoj, gajnas la atenton kaj subtenon de pluraj aŭtoritataj organizaĵoj. Esperanto estas populara en la urbo, pro tio la ĉeestanta publiko vigle aplaudis la jubilean raporton.

En sia salutparolado prof. d-ro Kiril Popov substre- kis la sukcesojn de la loka E-societo kaj ĝiajn imi-

tindajn metodojn de propaganda kaj organiza laboro, dank' al kiuj oni gajnas novajn adeptojn de la Internacia Ligo. Li substre- kis, ke aparte laŭdinda estas la nombro de la junaj membroj kaj aktivuloj. Prof. Popov donis konsilojn por estonta agado lige kun la gravaj renovigaj ŝanĝoj en la lando. Li enmanigis jubileajn medalojn al la veteranoj Canko Gospodinov, Hristo Manolov kaj Stefan Dimitrov.

Salutparolon en la nomo de la lokaj publikaj organizaĵoj faris Nikola Markov, substre- kante la internaciajn kaj porpacajn iniciatojn de la E-societo.

La prezidanto de E-societo „Hristo Kozlev“ ing. Borislav Borisov enmanigis honorajn diplomojn al 15 aktivuloj kaj helpantoj de la movado en la urbo.

Sekvis riĉa artprogramo. Sin prezentis grupo por plenumo de porpacaj kantoj ĉe la Junulara domo — Gorna Orjaĥovica kaj virina kantgrupo „Espero“ el la sama urbo. Longe ne ĉesis la aplaŭdoj, kiam sur la scenejo aperis la loka dancensembleo „Poljanci“.

Ne nur la esperantistoj, sed ankaŭ la lokaj loĝan- toj memoros tiun bone osanizitan kaj amase vizititan jubilean feston.

Krâstinka DIMITROVA

SOCIETO „LUMO“ JUBILEAS

La okazo, kiu kunvenis la 28-an de novembro ĉiujn membrojn de la societo de la blindaj esperantistoj „Lumo“ en Plovdiv kaj multajn gastojn estis la 30-jariĝo de la societo.

Solene malfermis la kunvenon la prezidanto Vladimir Jelev. Li parolis pri la historio de la societo de ĝia fondo ĝis nun, emfazis la kunlaboron kun diversaj esperantistaj kaj neesperantistaj organizaĵoj kaj la aktivan partoprenon de la blindaj esperantistoj en la esperantista kultura vivo en Plovdiv.

Estis tralegitaj gratuletero de la plovdiva „Arta Klubo'84“ kaj telegramo de E-societo „Espero“ en Varna. Poste la ĉeestantojn salutis Tanja Mileva — prezidantino de E-societo „Balkana Stelo“ kaj membro de la estraro de la Sekcio de Blindaj Esperantistoj ĉe BEA. En la nomo de DE de BEA salutis la societanojn Fani Miĥajlova. Veselina Kurteva — prezidantino de la plej granda plovdiva E-societo „Kulturo“, bondeziris al la jubileuloj riĉenhavan E-agadon.

Sekvis belarta programo, plenumita de la kantgrupo ĉe la societo, kiu estas laureato de kelkaj naciaj recitaloj de E-parolo kaj kanto.

Do, societo „Lumo“ jam atingis maturan aĝon. Ĝi havas bonajn tradiciojn kaj sperton en la organiza vivo, kiujn ĝi nepre devas sekvi kaj pliriĉigi ankaŭ estone.

Emilija PEJČINOVA

EN LA MEDICINA SEKCIO

Laŭ la plano de Bulgara Esperantista Asocio, la 14-an kaj 15-an de oktobro la Medicina E-Sekcio organizos en Bankja sian VII naci- an konferencon. La ĉefa temo estas: „Socia sano — amasa profilaktiko kaj konforma al la higienaj reguloj vivmaniero“. Partoprenantoj — esperantistoj kaj neesperantistoj-medicinistoj (je la 14. 10. — bulgarlingva sesio, je la 15. 10. — esperantlingva sesio). Prelegoj laŭ la temaro — ĝis 15 min. (kune kun la prezento de lumbildoj). Dezirantoj prelegi devas sendi la titolon de sia prelego kaj koncizan resumon ĝis la fino de aprilo kaj la tutan prelegon (tajpitan) — ĝis la fino de majo j.k.

La estraro de la Medicina Sekcio anoncas konkurson por biografio (pri la esperanta agado) de d-ro Vârban Genčev, antifasisto-esperantisto omaĝe al la 70-a datreveno de lia naskiĝo. La teksto devas ampleksi ne pli ol 50—60 tajpitajn paĝojn, senditajn al la estraro ĝis la 25. 10. 1988. Estos aljuĝitaj unua kaj dua premioj.



DEZIRAS
KORESPONDI

BULGARIO

VALENTIN GENCEV (25-jara) — Sofio 1680, ĵ. k. Krasno Selo bl. 215, vh. E, et. 2, ap. 96 — kun ĉi pri historio, sporto, moderna muziko kaj vojaĝoj. Kolektas BK, turismajn prospektojn, monerojn kaj esperantaĵojn.

DESI KRĀSTANOVA (16-jara) Sofio 1113, str. L. gradina 9, bl. 44, vh. A — kun ĉi pri ĉt.

MATEJ TODOROV ANGELCEV (30-jara) — Gorna Orjaĥovica, ul. Jurij Gagarin 4, ap. 4 — kun ĉi pri ĉt. Kolektas BK kaj esperantaĵojn.

POLLANDO

ŚLAWOMIR SZYMALA (25-jara), skr. poczt. 486, 42-217, Gzestochowa 17 kun ĉi, pri turismo kaj fotografio. Kolektas BK, mapojn kaj turismajn prospektojn.

EWA BIGOS (18-jara), 21-543 Konstantynów, woj. Biala Podlaska — kun ĉi pri ĉt.

MAREK CIUPEK (26-jara), 38-311 Szymbark 373, woj. Nowy Sącz — kun ĉi pri turismo, sporto kaj fotoarto. Kolektas BK kaj turismajn prospektojn.

BOCIAGA ZDZISLAW (26-jara), 98-300 Wielun, ul. Sieradzka 51 kun ĉi pri literaturo, sporto. Kolekt. PM.

DAMIAN A. ZACZEK (31-jara), 04-354 Warszawa ul. Daszowska 2/5 — kun ĉi pri politiko, filmo, aŭtomobila sporto k.a.

USSR

L. MJASNIKOV (33-jara), 182100 Velikie Luki, K. Liebknecht 3, kv. 15 — kun ĉi pri literaturo kaj E-movado.

IVA BELIK (16-jara), 264920 Novovolinsk. str. Pionerskaja 7-7 — kun ĉi pri ĉt. Kolektas BK kaj esperantaĵojn.

IEKA DENOVE STARTAS

La Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (IEKA) post sia kunveno dum la Jubilea Kongreso en Varsovio decidis plivastigi la informadon pri aŭtomobilistaj aferoj.

Multe da esperantistoj-aŭtomobilistoj vojaĝante tra la mondo bezonas: helpon ĉe riparado, informojn pri hoteloj, kampadejoj ktp.

IEKA helpas al vi solvi ĉi-tiujn problemojn pere de siaj landaj reprezentantoj aŭ IEKA-retoj en multaj landoj.

Sed ĉiuj esperantistoj povas helpi por pli granda disvastigo de la problemoj per aliĝo al IEKA.

Dumviva membrokotizo estas nur 4 dolaroj.

Nun oni preparas la eldonon de aŭtomobilista terminaro kaj plifortigas la kunlaboron kun Monda Turismo kaj aliaj organizaĵoj.

Se vi estas preta aliĝi al IEKA, turnu vin al via landa reprezentanto, aŭ se tia ne ekzistas en via lando, vi mem povas fariĝi la landa reprezentanto.

Por pliaj informoj skribu al provizora sekretario:

S-ino Julia Guillaume, 66 Village de Grasse,

F-78810 Feucherolles Francujo

aŭ al la vicprezidanto por informaj aferoj

S-ro Stanisław Mandrak, str. Korvoranów 39/16,

PL-44-114 Gliwice, Pollando.

ENHAVO

- 11 La komenco (M. Bojaĝieva)
 1. La renovigo de BEA
 2. Decido de la Plenkunsido de la Centra Estraro de BEA
 3. Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA
 4. Novaĵoj el UEA
 5. Niaj veteranoj: Esperanto prilumis mian vivon (Nikola Godev)
 6. Ni recenzas: Nova gramofondisko (Dimităr Terziev)
 6. Sub hispana ĉielo (Dončo Hitrov)
 8. Zamenhofaj tagoj (Sonja Tiĥova, Jordan Kalinov, Ilija Jordanov)
 10. 110 jaroj de la liberigo de Bulgario eslab osmana jugo: Versaĵoj de Ĥristo Radevski kaj Ĥ. M. Ĥrima
 11. Virina verkaro
 12. Martenicoj en Mongolio (Cvjatko Todorov)
 12. Zorgoj pri E-dokumentoj (Sv. Stojanov)
 13. Unua kongreso de kubaj esperantistoj (Marin Baĉev)
 14. In memoriam
 15. Enlanda movado
- IV. Por la unua fojo en Bulgario (Asen Bojaĝiev)

Sur la unua kovrilpaĝo:

En la ritmo de la bulgara popoldanco.

Foto: Kirilka SAVOVA

Cefredaktoro: Dončo HITROV

Redaktoroj: Ĥaim LEVI (vicecefredaktoro), Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BAĈEV, Mariana ELENOVA, Dimităr HAGIEV, Krāstju KA-RUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MI-TEV, prof. d-ro Kiril POPOV

Teknika arango: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

**Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — 1 grado
Eldonkvanto 6500 ekz.**

**Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97**

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66

1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

Por la unua fojo en Bulgario

VIVO POST LABORA-TORIA KONCIPO

La 3-an de januaro ĉi-jare en la Scienca Instituto pri Akuŝologio kaj Ginekologio en Sofio naskiĝis la unua bulgara bebo koncipita ekster la patrina organismo. La feliĉaj gepatroj — Tanja kaj Krum Tirilov, nomis sian filinon Iljana.

hirurgie forigitaj. Kompreneble, nepre necese estas, ke la geedzoj havu konservitaj la funkciojn por reproduktado de seksaj ĉeloj. Poste oni prenas de la pacientinoj taŭgajn por koncipado ovoĉelojn. Fine — post la ricevo kaj flegado de la embrio „in vitro“, oni ĝin enplantas en la virinan organismon. Ĉio ĉi postu-

Post la familio Tirilov plej feliĉa estas d-ro Ilija Vatev — respondeculo pri la biologia parto de la programo. La juna kuracisto-biologo konatigis en Parizo kun la sperto de la plej elstara franca skipo en la malsanulejo „Antoan Bekler“.

Dek unu tagojn post la naskiĝo de Iljana d-ro Vatev kaj liaj kolegoj ĝisatendis la naskiĝon de la dua bulgara bebo (knabeto), koncipita „in vitro“ Ĉi-foje tamen la gepatroj preferis konservi inkognitecon.

Kaj la 21-an de januaro, en urbo Ruse naskiĝis tria bebo — Galja, koncipita laŭ la sama maniero. La akuŝo okazis per cezara operacio.

NASKIĜIS KVIN GEME-LOJ!

Laŭ la statistiko tia surprizo okazas unu fojon je proksimume 409 600 000 naskoj. En nia lando kvin ĝemeloj naskiĝis por unua fojo.

La 25-an de decembro 1987 la familo de Tinka kaj Jordan Lakov el urbo Srednogie distrikto de Sofio) subite estiĝis gepatroj de tri filinoj (Miglena, Galja, Veronika) kaj de du filoj (Ilijan kaj Atanas).

La akuŝo estis sufiĉe malfacila elprovo ne nur por la patrino, sed ankaŭ por la deĵoranta kuracista skipo ĉe-kape kun d-ro Dobri Belĉev el la Distrikta Malsanulejo „D-ro Raĉo Angelov“ en Sofio.

La kolegoj de la 23-jara patrino — laboristoj el entrepreno por produktado de mebloj, donacis al la ĝemeloj plenajn komplektojn el littukoj, dormokovriloj, ĉusenetoj kaj vestoj. Per tiu „ekipaĵo“ la patro — konstrulaboristo, prenos hejme siajn ĝefilojn el la malsanulejo. Tamen unie ili devas dikiĝi, ĉar tuj post la nasko la plej malgranda bebo pezis nur 1 160 gramojn kaj la plej peza havis 1 810 gramojn.

La Komunuma Popola Konsilantaro en Srednogie disponigis al la multinfana familio novan pli vastan kaj komfortan loĝejon, kie pri la ĝemeloj krom ilia patrino zorgos ankaŭ flegistino el la loka polikliniko.

Asen BOJAGIEV



Iljana — la unua bulgara bebo, naskita laŭ la metodo „in vitro“.

Foto: Georgi Dermengiev

Antaŭ dek jaroj, en julio 1978, la mondo travivis eksterordinaran sensation. En Anglio naskiĝis Luiza Braun — la unua en la homa historio „bebo el provtubo“. De tiam la metodo „in vitro“, kies pioniroj estas la anglaj kuracistoj Robert Eduards kaj Patrik Steptou, malfermis novan eraon en la batalo kontraŭ sterileco. Ĝi ĉesis esti medicina miraklo kaj feliĉiĝis centojn da familioj. Hodiaŭ la infanoj naskitaj rezulte de „laboratoria koncipito“ estas ne malpli ol 1500 kaj proksimume por la triono de ili la patrolando estas Aŭstralio. Post Bern Hol apud Kembrigo jam en multaj aliaj landoj oni fondis specialajn klinikojn por „beboj el provtubo“.

La klasikan teknologion por kuracado de sterileco per laboratorie ricevitaj homaj embrioj oni aplikas kiam virino suferas je obstrukcio de la uteraj tuboj aŭ se ili estas

las tre altan precizecon. Sed la medicino ankoraŭ estas senforta garantii sukcesan evoluon de la embrio en la nova medio, en la patrina organismo.

Eksterlande la sukcesaj provoj rezulte de unu proceduro ne estas pli ol 15—20 procentoj. En la virinan organismon oni enplantas po tri embriojn, rezulte de kio ĉiam ekzistas ebleco pri naskiĝo de ĝemeloj.

La bebo el provtubo estas rezulto de la streĉa kolektiva laboro de biologoj kaj ginekologoj. Sed „La granda sakramento“ de la laboratoria koncipito ĉefe apartenas al la biologaj manoj. Pro tio la teknologio ĉie estas populara kiel bioingenieria. La biologo devas dum pli ol du tagojn senĉese observi la embrion, ĝis kiam venos la unika minuto, dum kiu oni devas enplanti ĝin en la virinan organismon.